

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2011

8-9

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2011. №8-9 (202-203)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, ALEN KRIS, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2011

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldon: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 550 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2011, №8-9(202-203).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 августа 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Oficiale

Rezolucio de la 96-a Universala Kongreso de Esperanto

Ni, la partoprenantoj en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj al Kopenhago el 66 landoj por komune dialogi pri la iniciato kiun UN lanĉis per la proklamo de Internacia Jaro de la Junularo,

efektiviginte multvidpuktan diskutadon pri tiu temo, en etoso de interkomprenemo kaj efika komunikado,

ĉerpinte el niaj unuopaj kaj kolektivaj spertoj kiel anoj de diversaj socioj, aĝogrupoj, etnoj, seksoj, mondbildoj, politikaj sintenoj kaj religiaj konvinkoj,

agnoskinte la kontribuojn de la junularo al la socio kaj la neceson malfermi ŝancojn por ĝia partopreno en la kolektivaj decidoprocezoj, por taŭge alfronti la diversajn defiojn kaj ŝancojn de la nuna realo — soci-ekonomiajn, ekologiajn, politikajn, teknologiajn ktp — cele al la estonteco de la homaro kaj la planedo,

konstatinte ke tra la epokoj kaj kulturoj, la diversaj generacioj rilatis inter si laŭ variaj modeloj kaj strategioj, kun foja estiĝo de aparta junulara kulturo, kaj ke en la Esperanto-movado mem tio esprimiĝis ekz. per la efike avangarda rolo plenumita de ties junulara branĉo en apartaj historiaj turnopunktoj,

rekomendas

ke la unuopaj organizaj instancoj kaj sociaj medioj de la Esperantaj movado kaj komunumo aktive strebu al la kreado de taŭgaj kondiĉoj por kontakto, alproksimiĝo kaj kunlaborado inter junuloj kaj aliaĝuloj, ke la anoj de la malsimilaj aĝogrupoj en Esperantujo iĝu pli konsciaj pri la potencialo kiun por intergeneracie kontentigaj rilatoj liveras la esperantisma ideo mem de reciproka respekto kaj ambaŭdirekta bona volo,

alvokas

al UEA, TEJO kaj iliaj respektivaj landaj organizoj pli-proksimigi tempe kaj geografie siajn kongresojn, same internaciajn kiel landajn kaj regionajn, per kunordigita decidado,

al konkretaj paŝoj ĉiunivele por kunagigi esperantistojn rete kaj eksterrete agantajn, same por enmovadigi perretajn lernintojn de la lingvo, kiel por helpi la tradician movadon adaptiĝi al la nuna epoko.

Kopenhago

30 julio 2011

Iom escepte ni aperigas en ĉi tiu paĝo la oficialan kongresan rezolucion, ĉar la rezolucio mem estas escepta — ĝi estas direktita ne al la ekstera publiko, sed al la esperantistaro. Tamen *La Ondo* ne devas entrepreni specialajn kunagigajn strebojn, ĉar ni ĉiam donas atenton al ĉiuj interesaj eventoj kaj projektoj, sendepende de la aĝo de ties partoprenantoj kaj organizantoj. Same estas en ĉi tiu postkongresa kajero kun kovropaĝa urbocentra foto el Kopenhago (fotis Kalle Kniivilä), kie en UK laŭdire plejmultis grizharuloj, kaj kun la dorspaĝaj grupfotoj el Kievo kaj Nitra, kun multaj junaj partoprenantoj.

Pluva, sed malskandala kongreso

**96a Universala Kongreso de Esperanto
Kopenhago, la 23–30an de julio 2011**

La 96a Universala Kongreso en Kopenhago estis eble la plej malskandala, kaj eble la plej pluva, dum la pasinta jardeko. Nu, la manko de skandaloj temis nur pri la movada flanko. Ne estis kvereloj, kritikoj, maldungoj, demisioj aŭ grandaj internaj skandaloj.

La kongreso okazis tuj post la ekstremdekstraj bombo kaj atako en Norvegio kaj la malfermo honoris viktimojn de la atako. Plej kortuŝe estis la reago al la norvega landa saluto “La amo venkos malamon. Amu!” kiun la kongresanoj honoris ekstarante.

Pri la senproblemeco de la kongreso atestis ankaŭ la ĉeesto de ĉiuj laborantoj de CO jam komence de la programero “Centra Oficejo respondas”. Kutime iu, plej ofte la Kongresa Sekretario, forestis por solvi iun problemon. Eĉ sendrata interreto funkciis en la kongresejo, ĉu la unuan fojon? Ankaŭ la demandoj al la Centra Oficejo, kaj same al la Estraro estis apenaŭ kritikemaj. Nu, la demandoj por la estraro ne estis aparte altkvalitaj (temis, interalie, pri elekto de kongresloko, plendoj pri pasintjaraj decidoj, manko de kunveno de iu faka asocio), sed la respondoj ankaŭ ne tre imponis.

Pluvis preskaŭ ĉiutage, nur la ekskursata tago, feliĉe, estis senpluva. Pluvo ne aparte malhelpis tiujn, kiuj restis en la kongresa hotelo (ĵus pretiĝinta) kun koridoro al la kongresejo, sed ja tiujn, kiuj elektis malpli koston loĝadon. Metrostacio estis je kelkcentmetroj de la kongresejo, kiu ankaŭ situis meze de nenio, en ia arbustaro aŭ erikejo. Krome, inter la du turoj de la hotelo, la plej mallonga vojo de la metrostacio al la ĉefa enirejo de la kongresejo (jes, necesis ĉirkaŭiri duonon de la kongresejo por trovi malfermitan pordon), formiĝis ia ventokoridoro, kaj temis pri sufiĉe forta vento. La kongresejo cetere estis en ordo, kvankam la elekto de restoracio estis malgranda, aparte por vegetaranoj, kaj kiel kutime malfacile troveblis salono Hodler, kie kunvenis la komitato.

La kongresa urbo estas inter la plej multekostaj urboj en la mondo, sed ĉio ja estas relativa: troviĝas diverskostaj hoteloj kaj aliaj loĝeblecoj, kaj ankaŭ manĝoj. Kaj malgraŭ la monopol-instigita situo, la prezoj en la kongresejo ne estis pli altaj ol en la urbo ĝenerale.

La kongreso videblis ankaŭ en la urbo. En la ĉefa piedira strato estis pendigitaj slogantukoj pri la kongreso, Esperante. Tamen ili restis nur dum la unua duono de la kongresa semajno. Unu el tiuj slogantukoj estis vendita en aŭkcio per malgranda sumo: ĝi ja ne facile uzeblus, kiel tablotuko ĝi estas tro granda kaj kutimaj hejmoj ne havas lokon por pendigi tiaĵojn. En la aŭkcio, cetere, nur la Zamenhofa poŝtkarto (1100 kronoj) superis la kongresan numeron unu de la venonta UK (999 kronoj), kaj ili du ĉiujn librojn kaj jar-kolektojn de gazetoj.

Iel la kongreso estis interna por esperantistoj, ekzemple la kongresa rezolucio (vidu la 2an paĝon) estas direktita nur al esperantistoj, sen aludoj



al mondaj problemoj aŭ alvokoj al registaroj, kaj laŭ Brian Moon, kiu kutime tradukis ĝin en la anglan, ne indas traduki rezolucion al ajna alia lingvo.

Strategio klare mankas kaj tion ne eblas forigi per filozofiaj vortoj, aŭ per nekompreno pri la rolo de komitato kaj de estraro en la gvidado de la asocio. Ne klaras, ĉu la komitato fakte akceptis reformon de la elektosistemo, aŭ ĉu la decido estos konfirmita en Hanojo venontjare. Tio tamen ne gravas, ĉar venontjare ne okazos elektoj. Interese estis vidi Osmo Buller kaj Renato Corsetti en la sama flanko esprimante dubojn pri la utilo de la reformo. Plej aktive la komitato tamen diskutis pri la portempa forigo de la branĉo “Kanto” el Belartaj Konkursoj, sed laŭ la komitata tradicio (voĉdoni ĉiam “por”), ĝi estis akceptita.

(Fino en la 4a paĝo)

Ombrelo estis populara aĵo en la Kongresa libroservo, eĉ super *ABZ de amo* eldonita antaŭ 39 jaroj en Kopenhago. *(Fotis Kalle Kniivilä)*



(Komenco en la 3a paĝo)

La ĉefa skandalo de la kongreso temis pri la uzo de la angla, aŭ de naciaj lingvoj. En la malfermo la dana direktoro de la Kopenhaga oficejo de la Loĝantara Fonduso de UN, s-ino Pernille Fenger, tamen parolis la danan, sed mankis la klarigo, ke la traduko venos post la tuta dekminuta parolado. Enuinte pro la nekomprenebla nacilingvaĵo unu kongresano venis diri al ŝi, ke “ni ne komprenas” aŭ ion similan (ne aŭdeblis al la publiko). La reago de la parolanto estis tuja — angle: mi povus paroli angle, sed mi estis petita paroli dane, la traduko venos poste. Nu, certe pli da kongresanoj komprenus angle ol dane, sed granda parto certe ne komprenus kaj ne ĝuus la anglan version.

En la urbodomo la vicurbestrino pri kulturo parolis la anglan, kio kaŭzis laŭtan proteston, kiu feliĉe estis silentigita per “ni estas gastoj ĉi tie”. Interese, ke iuj teleroj de la urbodomaj patkukoj portis signon “senalkohola”, ĉu do, la aliaj estis kunalkoholaj? Nu, ĉiukaze estis havebla ankaŭ vino. Ankaŭ dum la ekskursita tago unu loka ĉiĉerono estis mendita paroli la anglan.

Krome en nacia vespero la reĝisoro de la gronlanda kantoensemblo enkondukis la kantojn en la angla, kaj la postulema publiko reagis kaj per vorto “mikrofono” kaj per krio “ni ne komprenas”, sed feliĉe la lasta estis silentigita, dum la reĝisoro prenis kelkajn paŝojn al la mikrofono. La nacia vespero okazis en la amuzparko Tivoli, kien la kongresanoj ricevis senpagajn biletojn. Feliĉe la loko estis koncertejo endoma kaj ne subĉiela. Jes, pluvis ankaŭ dum tiu vespero.

Lingvopolitiko kaj praktiko de UEA videblis ankaŭ en komitataj diskutoj. La reformo de la retejo de UEA estas bezonata interalie pro tio, ke ne eblas tra retejo aĉeti lernolibron de Esperanto sen scipovi Esperanton, kiel reprezentanto de TEJO kritikis. Nu, ankaŭ parton de la problemo solvus la uzo de la angla.

Dum la ekskursita tago tiuj kongresanoj, kiuj ne ekskursis laŭ la kongresaj ofertoj svarmis al Christiania, la alternativula urbeto, kie malferme vendiĝis certaj specoj da narkotikaĵoj, sed kie biero ne estis servata en vegetarana restoracio (sed ja en la apuda vendejo). Alternativa vivmaniero klare interesis alternativulojn-esperantistojn.

Jukka Pietiläinen

Salutmesaĝo de Unesko al la 96a Universala Kongreso de Esperanto



Estas por mi granda plezuro sendi miajn salutojn al ĉiuj partoprenantoj de la 96a Universala Kongreso de Esperanto.

Koncentrigante al “dialogo kaj interkompreno”, la elektita temo de la nuna Internacia Jaro de Junularo de UN, vi kontribuas al la antaŭenigo de la idealoj de paco, libereco, progreso kaj solidareco, kiuj esencas por kapabligi la junularon kaj atingi la

Jarmilajn Evoluigajn Celojn.

En tiuj noblaj celoj partoprenas ankaŭ Unesko, kies Membro-Ŝtatoj — cite el nia Konstitucio — “firme intencas evoluigi kaj kreskigi la rimedojn de komunikado inter siaj popoloj kaj uzi tiujn rimedojn cele al reciproka kompreno kaj pli vereca kaj perfekta konado de la vivo de aliaj”.

Estante distinga karakterizaĵo de la homa ekzisto kaj kovrante la tutan gamon de homaj emocioj, opinioj kaj valoroj, lingvoj funkcias kiel nemalhaveblaj portiloj de dialogo, toleremo, kompreno kaj respekto inter popoloj, sociaj grupoj kaj generacioj.

La Esperanto-movado, fondita antaŭ pli ol cent jaroj, persiste promocias egalecon inter la lingvoj, kulturoj kaj popoloj de la mondo. Simile, Unesko estas konvinkita, ke multlingveco iĝis esenca por konservi la mirindan diversecon kiu karakterizas la homaron, precipe en la nuna epoko de ĉiam kreskanta tutmondiĝo. Plie, estante integra parto de niaj identecoj multlingveco iĝis vaste agnoskata kiel strategia faktoro por paco kaj daŭrigebla evoluo.

Unesko do aplaudas la grandegajn klopodojn de esperantistoj ĉie en la mondo dum la lastaj jardekoj. Tiurilate la 96a Universala Kongreso de Esperanto formas valoran kontribuon al la lukto por antaŭenigi lingvan diversecon kaj reciprokan komprenon.

Al Universala Esperanto-Asocio kaj al ĉiuj partoprenantoj en tiu ĉi 96a Universala Kongreso de Esperanto, mi volas esprimi miajn plej varmajn bondezirojn por fruktodonaj kaj stimulaĵaj laboroj.

Irina Bokova, Ĝenerala Direktoro de Unesko

Premio Onisaburo Deguĉi al Hori Jasuo

La Estraro de UEA aljuĝas la Premion Onisaburo Deguĉi por agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de D-ro L. L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. La premio, starigita per donaco de Oomoto, konsistas el diplomo, monsumo de 2000 eŭroj kaj donaceto de Oomoto.

Ĉi-jare la Premion Deguĉi ricevis Hori Jasuo el Japanio pro multjara agado por konigi la japanan kulturon tra la mondo per prelegvojaĝoj, artikoloj kaj libroj, inter kiuj elstaras lia almanako *Raportoj el Japanio*.

Diplomoj al 12 elstaraj aktivuloj de UEA

La Estraro de UEA distingis ĉi-jare per diplomoj 12 Esperanto-aktivulojn.

Diplomo pri Elstara Agado: Jorma Ahomäki (Finnlando) pro elstara loka agado kaj gazetara informado pri Esperanto; Augusto Casquero (Hispanio) pro instruado de Esperanto en Ĉinio kaj Vjetnamio; Helmar Frank (Germanio) pro elstara antaŭenigo de Esperanto kiel lingvo de scienco, precipe pere de la Akademio Internacia de Sciencoj; Francois Xavier Gilbert (Francio) pro longtempa gvidado de la Koresponda Servo Mondskala de UEA; Heidi Goes (Belgio) pro sukcesa agado por disvastigo de Esperanto en Indonezio; Mireille Grosjean (Svislando) pro laboro por Esperanto en Afriko kaj utiligo de Esperanto por interkultura edukado; Andrzej Grzębowski (Pollando) pro antaŭenigo de turismo per Esperanto kaj pro agado sur la kleriga kampo; Geza Kurucz (Hungario) pro modela redaktado de la revuo *Juna Amiko*;


Diplomo pri Elstara Arta Agado: Kim Henriksen (Danio) kaj Jean-Marc Leclerc (JoMo, Francio) pro longtempa kontribuo al la Esperanto-muziko; Carmel Mallia (Malto) kaj Abel Montagut (Katalunio) pro elstara kontribuo al la Esperanta poezio.

GK UEA

IJK-67: sukcesa, sed tamen...

Inter la 14a kaj 21a de julio en Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio, okazis la 67a Internacia Junulara Kongreso. Ĝin partoprenis ĉ. 250 homoj el ĉ. 30 landoj (pli ĝusta statistiko ankoraŭ ne haveblas; oni scias precize nur la kvanton de la retaj aliĝintoj — 319 el 35 landoj). La ĝenerala opinio de multaj partoprenantoj, enketitaj de mi, estis pli-malpli la sama: la kongreso sukcesis, sed la organizaj fuŝoj estis pli multaj, ol kutime dum IJKoj.

La kongresejo troviĝis ĉe la urborando en porjunulara gastejo (en ĝi loĝis ankaŭ neesperantistoj, kiuj foje estis sufiĉe agacataj de la esperantista nokta aktivado; feliĉe, oni sukcesis evitigi konfliktojn); apudis la lernejo, en kiu ĉefe okazis la kongresaj programeroj. Tamen la solena malfermo de la kongreso okazis en la centro de la urbo, kio kaŭzis la unuan malfacilaĵon por la partoprenantoj: ne ĉiuj sukcesis atingi ĝin, kaj la rean veturon al la kongresejo la plimulto devis fari memstare (ĉar oni mendis nur unu buson). Antaŭ la malfermo okazis iom ĥaosa gazetarkonferenco, kiu tamen rezultigis menciojn pri la kongreso en la novaĵ-programoj de du tutlandaj televidkanaloj: *Ukrainio* kaj STB. La programo de la malfermo konsistis ĉefe el la prezentaĵoj de diversstilaj Ukrainiaj muzikaj kolektivoj. Amuze kaj bizare (almenaŭ por mi): ĉio sur la scenejo okazis en la ukraina lingvo kun posta tradukado al Esperanto (evidente iom haste organizita).



La gajaj vizaĝoj de kongresanoj dum koncertoj elokvente atestas, ke la unua IJK en Ukrainio, malgraŭ organizaj fuŝoj, efektive estis sukcesa. (Fotis Ivo Miesen)

La programo de la kongreso estis pli-malpli tradicia kaj sufiĉe riĉa. La partoprenantoj manĝis en apuda restoracio (la unua vespermanĝo estis prokrastita je pli ol unu horo pro miskomprenoj inter la kuiristoj kaj la organizantoj) kaj havis la okazon lukti kontraŭ la somera varmego naĝante en lagetoj en la proksima parko aŭ duŝante sin en la kongresejo mem (multaj plendis pri manko de la varma akvo, sed, kiel mi scias, tion kaŭzis problemo pri la akvo-provizio en la tuta distrikto).

Krom la kutimaj tagaj klerigaj programeroj okazis multaj vesperaj koncertoj; estis organizitaj ankaŭ la ekskursaj kaj sportaj tagoj. Ne eblas ne diri, ke la programo dum la tuta kongreso estis

retajlata, flikata kaj preskaŭ plene reverkata plej haste kaj neatendite, kio foje kaŭzis problemojn kaj al la partoprenantoj, kaj al kelkaj ĉef-respondeculoj pri la apartaj programeroj. Feliĉe, almenaŭ la TEJO-aktivaĵoj pasis pli-malpli sukcese, doninte al la organizo novan estraron kaj novan prezidanton (*vidu la apudan komunikon*).

Tamen kompanse oni devas nepre laŭdi la koncertan programon, kiu kvalite multe superis la klerigan — la organizantoj sukcesis inviti multajn popularajn kaj interesajn artistojn. Koncertis JoMo, Martin Wiese, Ĵomart kaj Nataŝa, Platano (Cyrille Poullet el la rep-bando *Pafklik*) kaj kelkaj aliaj. Bedaŭrinde, mankis granda halo por la vesperaj programeroj (la lernejo ja havis tiun halon, sed oni ne povis ĝin uzi post iu difinita horo) — rezulte ĉiuj koncertoj okazis en nesufiĉe granda ejo preskaŭ sen seĝoj, kio tamen ne multe malhelpis la publikon.

La plej agrabla kaj neatendita surprizo por la partoprenantoj ĉe la fermo de la kongreso estis finfine ekvidi la tutan organizan teamon, kiu dum la tuta kongreso (ankaŭ dum la malfermo) estis preskaŭ nevidebla aŭ videbla nur parte. Mi sincere esperas, ke la kongreso, kiu donacis al multaj homoj multege da interesaj kaj agrablaj impresoj, iom instruos la organizantojn kaj la tutan Ukrainian Esperanto-movadon, kies internaj streĉoj kaj konfliktetoj jam delonge forkonsumas multe da utiligebla energio — pli da kunlaboro ja certe povus rezultigi malpli da organizaj malperfektaĵoj, je kiuj riĉis la unua IJK en Ukrainio.

TEJO kun novaj estraro kaj prezidanto



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) ricevis novan Estraron en la 67a Internacia Junulara Kongreso, okazinta en Kievo. **Łukasz Żebrowski** el Pollando (*vidu lin en la apuda foto*) fariĝis la nova prezidanto, transprenante la postenon de la aŭstro Gregor Hinker, kiu gvidis la junularan sekcion de UEA dum du oficperiodoj ekde 2007. En la antaŭa Estraro Żebrowski respondecis pri kongresoj kaj aktivula trejnado.

Ankaŭ du aliaj estraranoj estis reelektitaj: **Paulína Kožuchová** el Slovakio daŭrigos kiel ĝenerala sekretario, dum la antaŭa kasisto **Sergeo Tyrin** el Israelo ekde nun respondecas pri informado.

Kvin anoj de la okkapa Estraro estas novaj: **Alisa Nikitina** el Ukrainio (kasisto), **Nico Huurman** el Nederlando (aktivula trejnado), **Petra Smidéliusz** el Hungario (landa agado), **Michael Boris Mandirola** el Italio (eksteraj rilatoj) kaj **Tina Tišljarić** el Kroatio (kongresoj).

La elekto de la nova Estraro okazis en la kunsido de la Komitato de TEJO la 16an de julio. En la komunikado en la retejo de TEJO la Estraro, kiu stiros TEJON dum du jaroj ĝis 2013, “dankas pro la fido de la komitatoj kaj strebos laŭeble plenumi ĉiujn esperojn je ĝi”.

GK UEA

Paŭlo Moĵajev

ILEI en renoma universitato

La 17–23an de julio 2011, la 44a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazis en Kopenhago, kun la temo “Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado” kun 103 partoprenantoj el 35 landoj, inkluzive de 14 ekstereŭropaj landoj.

La prezidanto de ILEI, Stefan MacGill, en sia festparolado parolis pri lastatempaj konferencoj; el la ses inter 2007 kaj 2012, kvar okazis aŭ okazos ekstereŭrope, du el ili partopren-rekordaj por ekstereŭropaj aranĝoj. La ĵusa konferenco, kvankam en Eŭropo, havis rekorde internacian karakteron. La konferenco tradicie respegulis la tri pilierojn de ILEI-konferencoj, kun faka, labora kaj distra program-fadenoj.

Faka programo abundis. Kulmina programo estas simpozio “Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado”, organizita de ILEI, kunlabore kun la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj la humanistika fakultato de la Universitato de Kopenhago. Ne nur esperantologoj, sed ankaŭ eksteraj fakuloj pri komunikado kaj lingvistiko partoprenis kun entute 19 prelegoj. La vicprezidanto de ILEI, Duncan Charters, enkondukis tiun temon, skizante la historion de aranĝoj kie esperantistoj kaj neesperantistoj kunlaboris tra lastaj jaroj por esplori diskriminaciajn praktikojn en transnaciaj kontaktoj, parolis pri kontraŭaj evoluoj ĉe lingvoelektaj en edukado — dum iuj iniciatoj enportas novajn lingvojn, aliaj tendencoj gvidas al kreskanta limigo de elektebloj. Li donis konkretajn ekzemplojn pri nebona funkciado de tradukservoj kaj komunikado en sciencaj konferencoj laŭ la nunaj modeloj.

En la kvin konferencaj salonoj okazis 35 prelegoj, prezentaĵoj aŭ diskutondoj. La programon de la seminario



La prezidanto de ILEI, Stefan MacGill, prelegas en Kopenhago. (Fotis Trezoro)

“Flugiloj de interkultura vento” realigis Duncan Charters, Julián Hernández, Zsófia Kóródy kaj Radojica Petrović. Ĝi temis pri la metodiko de Esperanto-instruado inkluzive de instruplanado, didaktikaj aspektoj de la Esperanto-grammatiko, lingvo kaj kulturo en pedagogiaj programoj, teknologio je la servo de lingvo-instruado, kiel instrui simple kaj efike en naturaj cirkonstancoj, kaj pri interkulturaj lingvaj ludoj.

Apartajn prelegojn pri diversaj temoj prezentis, interalie, Zsófia Kóródy (Pri la lingvoekzamenoj, kaj Subvencioj kaj projektoj en la praktiko), Lee Jungkee (Esperanto-kurso en Koreio), Stefan MacGill (La projekto *esperanto125*), Ronald Glossop (Kial Ĉinio estas fekunda kampo por Esperanto), Agneta Emanuelsson (Valdemar Langlet), Martin Schäffer (Informado pri Esperanto: kiel artikoli gazete kaj respondi al ĵurnalistoj) k. a.

Aparte populara estis “Erarologio” de Rob Moerbek, kiu, pro granda interesiĝo de konferencanoj, daŭriĝis eksterplane per matenaj sesioj antaŭ la cetera programo. Simile Duncan Charters ripetis dum lunĉpaŭzo sian prelegon pri lerneteknologioj por tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la unuan prezenton pro aliaj, neeviteble paralelaj programeroj.

KER: Pli ol 500 ekzamenitoj!

La 22an sesion de la KER-ekzamenoj en la Kopenhaga UK partoprenis 47 kandidatoj el 22 landoj. Per tiu nombro de ekzameniĝintoj ni atingis la magian nombron 500. Pro tio la organizantoj dum la Internacia Vespere lote elektis la bonŝancan ekzameniĝinton, kiu ricevos sian ekzamenkotizon. La gajninto estas Didier Cornuet el Francio.

La sesion gvidis Katalin Kováts, kunekzamenis: Mónika Molnár, Duncan Charters, Renato Corsetti, François Lo Jacomo kaj Zsófia Kóródy. La administran laboron kaj la aligon faris Petra Smidéliusz kaj Mónika Molnár, dum la ekzamenoj helpis Alain Delmotte kaj Sylvain Lelarge.

Katalin Kováts

Ronald Glossop kaj Latifou Gbadamassi per komuna prezento de la projekto *Infanoj ĉirkaŭ la mondo* kaj ties specifa apliko en Afriko tra *Infanoj ĉirkaŭ Afriko* enkondukis debaton pri Afrika perspektivo de ILEI-agado. Simile Mireille Grosjean kaj Heidi Goes per prelegoj, respektive, “Aziaj etosoĵ” kaj “La indonezia Esperanto-movado: historio kaj estonto”, enkondukis debaton pri ILEI ekstereŭrope kun aparta atento pri ILEI en Azio renkonte al la 45a konferenco okazonta en Ĉinio, 2012.

La “Universitatan tagon” jaŭde enkondukis Mallely Martínez Mateos (“Kiel enkonduki Esperanton en universitatojn: spertoj el Meksiko”) kaj Yu Jianchao (“Esperanto-eduko en Ĉina Komunikada Universitato”). En paralelaj sesioj Martin Schäffer prezentis la projekton *Esperanto Internacia*, kaj Peter Baláž kaj Marek Blahuš la atingojn kaj planojn de E@I.

En la tradicia ILEI-konferenca festivalo, la konferencanoj prezentis 20 lingvojn kaj kulturojn, inkluzive de diversaj skribsistemoj kaj elementoj de la koncernaj kulturoj. Laŭkutime, la konferenco ankaŭ omaĝis la lingvon de la gastiganta lando per dusesia kurseto “Dana eksprese” (Jonas kaj Mathias Dalmose kaj Bent Jensenius).

Dum la konferenco okazis kunveno de komisionoj pri lerneja kaj universitata agado, laborrondo por sekcioj de ILEI kaj diskutsesio pri la perspektivoj por estontaj konferencoj. Okazis en tri tagoj sep horoj da komitat-kunsidado; la 32 komitatanoj akceptis la jarraporton, financajn rezultojn kaj revizoran raporton por 2010. La komitato nomumis du novajn honorajn membrojn (Bertil Andreasson kaj Mauro la Torre) kaj novan ligan sekretariojn, Huang Yinbao (Trezoro). Ĝi nuligis tri nefunkciajn sekciojn, sed akceptis novan en Meksiko. Aldoniĝis reprezentanto en Ganao kaj kontaktpersonoj en Indonezio kaj Nepalo. La ĉefa komitata tasko, efike kaj kunlabore plenumita, estis traktado de trideko da modifproponoj al la ligo Statuto kaj Interna Regularo. La plimulto estis aprobitaj, sed kelkaj defiaj alineoj estis plusenditaj al la regulara komisiono kaj al reta diskutado inter komitatanoj.

La distra programo, promenoj kaj la amikeca Esperanta etoso mallongigis la distancon inter la konferencanoj.

Huang Yinbao,
Radojica Petrović, Stefan MacGill

SAT-kongreso en Sarajevo

La 84a SAT-kongreso, okazis 30 jul – 6 aŭg en Sarajevo, la ĉefurbo de Bosnio kaj Hercegovino, kie iam okazis la terorisma ago, fariĝinta preteksto por la 1a mondmilito. Ĝi estis ne tro multnombra (ĉ. 70 partoprenantoj), sed tre bone organizita (ĉefan dankon pro tio al Senad Ĉolić) kaj saturita de altnivelaj programeroj.

Tiuj estis seminario pri la kongresa temo *Tutmondiĝo kaj nacia fenomeno*, kiun majstre gvidis prof. François Lo Jacomo; prelegoj pri lingvaj aspektoj de operaciaj sistemoj (Samir Ribić), pri fervojoj kaj fervojistoj antaŭe kaj nun (Pavlin Boevski), pri scienc-populara literaturo en Esperanto (Nikolao Guds-kov) kaj aliaj; libroprezentoj de Spomenka Štimec kaj Senad Ĉolić. Ankaŭ la arta programo estis altnivela pro la partopreno de bosniaj profesiaj muzikistoj, al kiuj aliĝis esperantistoj: aktoro Saša Pilipoviĉ, kiu prezentis sian biografion en formo de solspektaklo, gitaristo Lino Markov kaj aliaj.

Kongresoj de SAT kutime distingigas per “alternativa turismo”: vizitoj al entreprenoj, renkontiĝoj kun sindikatestroj ktp. Ĉi-jare okazis io alia: apud la ordinaraj ekskursoj en interesaj lokoj estis ekskursoj en la lokoj, memorigantaj la antaŭnelongan kruelan militon en Bosnio inter malsamaj “etnaj” (pli precize: konfesiaj) komunumoj. Kvan-kam la milito ĉesis antaŭ 15 jaroj, ĝi postlasis multajn cikatrojn, kiuj ankoraŭ longe doloros. Tial ekskursoj al la “milita tunelo”, fosita dum la sieĝo de Sarajevo printempe de 1993 por organizi provizadon de la sufokata urbo, kaj al la urbeto Srebrenica, apud kiu en 1995, sub bonvolema observo de la UN-taĉmento, estis mortigitaj pli ol ok mil senarmilaj rifuĝintoj, estis tre elvokivaj. En Sarajevo, Tuzlo kaj aliaj urboj oni ofte montris lokojn, kie pacaj loĝantoj pereadis pro bomboj aŭ teroristaj atakoj. Tial la problemoj pri paco, kaj laboro de la pacista frakcio de SAT, fariĝis centra por la kongreso.

Tre enhavriĉa estis ankaŭ la postkongresa programo en Hercegovino, kiu inkludis viziton al la kroatia urbo-perlo Dubrovnik sur la Adriatika bordo. En Hercegovino la partoprenantoj ne nur vizitis elstarajn vidindaĵojn, sed ankaŭ renkontiĝis kun lokaj esperantistoj, apartenantaj al diversaj etnaj-konfesiaj grupoj.

Olda Koboldo

SES: ĉu ankaŭ alikontinente?

30 jul – 7 aŭg en la ĉarma Slovaka historia urbo Nitra okazis la kvara SES: Somera Esperanto-Studado, kiun ĉi-jare partoprenis sume 191 homoj el 28 landoj.

Ĝi celas proponi al uzantoj de lernu.net vivan renkontiĝon kaj plibonigi ilian nivelon de Esperanto per antaŭtagmezaj kursoj kaj diversaj distraj posttagmezaj programoj kaj prelegoj. Tamen ne mankas ankaŭ jam la tradicia seminario “Flugiloj de malfacila vento” por interesatoj pri instruado de Esperanto, kiun gvidis ĉi-jare Radojica Petrović, Julián Hernandez kaj Xosé Conde.

La aranĝon kunorganizis E@I kaj SKEJ, kunlabore kun pluraj slovakaj esperantistoj kaj staĝantoj de E@I.

La partoprenantoj ĝuis riĉan programon. Ekzemple: dimanĉe promeno tra la urbo, marde grimrado al la apudamonto Zobor, merkrede du ekskursoj: unu al Bratislava, la dua al Topoľčianky. Kaj dum la tuta semajno oni povis elekti inter multaj prelegoj, interalie pri Vikipedio, E@I, Slovakio aŭ “Kiel mastrumi sian tempon”.

Ĉiutage post la vespermanĝo partoprenantojn atendis riĉa kultura programo. Plej ofte temis pri koncertoj, interalie, de la sveda grupo *La Perdita Generacio*, kiu sukcesis ne nur kantigi sed ankaŭ dancigi homojn, aŭ de la familia litova muzikgrupo *Asorti*. Sed ne mankis ankaŭ nacia vespero kun koncerto de la slovakia familio Hlbocký (du gepatroj kaj sep infanoj!), kiu kantis popolajn kantojn. Post la koncerto okazis inter

partoprenantoj populara vingustumado. Ĵaŭde okazis internacia vespero, dum kiu oni povis spekti aziajn dancojn, lerni anglan kanton aŭ ĝui denove du kantojn de kvin belaj polinoj el la grupo *Junaj voĉoj* (dum SES ili havis ankaŭ apartan koncerton *Vento el Montaro*). En la fino de la internacia vespero estis komuna fotado. Ĉiam post la vespera programo en la salono okazis ankaŭ nokta programo, do gufujo, trinkejo kaj filmejo, en kiu oni povis ĉiuvespere spekti filmojn kun subtiluloj en Esperanto.

Sabate, dum la adiaŭa vespero organizantoj anoncis, ke pro la sukceso kaj bone elektita loko SES okazos la sekvan jaron plej verŝajne denove en Nitra. Samtempe inter organizantoj komenciĝis diskuto pri postaj jaroj — unu el la proponoj estas organizi SES en la jaro 2013 en Germanio, tamen sub kondiĉo, ke prezoj ne estos multe pli altaj ol en Slovakio, por ke la SES daŭre estu favorpreza ankaŭ por homoj el malpli pagipovaj landoj. Alia propono estas organizi plurajn SES-ojn dum sama jaro, sed en malsamaj kontinentoj, ĉar la vojaĝkostoj por homoj el Azio aŭ Aŭstralio (eĉ de tiu lando venis unu partoprenanto) estas vere altaj. Eble do en proksima estonto aperos ankaŭ SES-oj en Ĉinio, Aŭstralio aŭ Brazilo...

Pozitiva raporto pri Esperanto kaj SES aperis en ĉefaj televidaj novaĵoj en privata televido Markiza, en loka televido Nitrička, samkiel en pluraj gazetoj kaj retaj novaĵ-servoj.

Informoj pri SES troveblas ĉe:

www.lernu.net/ses

Miroslav Hruška

La instruteamo de SES: Xosé Conde (Hispanio), Nina Pietuchowska (Pollando), Dalia Pileckienė (Litovio), Radojica Petrović (Serbio), Márta Kovács (Hungario), Stano Marček (Slovakio), Petra Smidéliusz (Hungario), Julián Hernandez Angulo (Kubo). (*Fotis Peter Baláž*)



La unua IES en Armenio

La unua Internacia Esperanto-Semajno okazis 29 jun – 5 jul 2011 en la armena ĉefurbo Erevano kaj en la ripozurbo Tsakhkadzor kun 41 partoprenantoj el kvin landoj.

En la domo de AOKS (Armena societo de kulturaj kontaktoj kun fremdaj landoj) vicprezidanto de AOKS s-ino Anna Egibjan salutis kaj bonvenigis la partoprenantojn de IES-1 en Armenio. La Semajno pasis sub la devizo “Paco en la tuta Mondo (interkompreno, toleremo)”. Pri “Esperanto kiel lingvo por paco” prelegis Lida Elbakjan, kaj Hripsime Mkrtĉjan pri “La lingvo kiu amikiĝas”.

Post tri tagoj en Erevano, IES daŭris en Tsakhkadzor kun prelegoj pri, interalie, instruado de Esperanto en Hindio (Ugo Alessandro De Riu, Italio), itala kuirarto (Grazia De Riu, Italio), svisaj fromaĝoj (Elizabeth Bertelli Vuille kaj Roberto Bertelli, Svislando). Senvortan Esperanto-rakonton prezentis Giuseppe Bonora el Italio.

Vigla diskuto sekvis la prelegon “Esperanto hodiaŭ” de Susanna Baghdasaryan: nun Esperanto malsaniĝas kaj maljuniĝas, oni bezonas “modernajn kuracistojn kaj medikamentojn”. Ĉu iu povas rekomendi bonajn kuracilojn aŭ metodojn krom varbadon? Per varbado Esperanto nek resaniĝos, nek juniĝos, nek venkos! Necesas serioza kaj forta ekstera strategio. Krome, ankaŭ interkompreno, kunlaboro kaj toleremo inter la anoj de Esperantujo.

Dum IES-1 estis organizita fotokurso “La amikeco savos la Mondon”, en kiu la unuan premion gajnis la foto “Amikeco”, sendita de Annarosa Andrei el Italio. La duan premion ricevis Granma Esperanto-Filio el Kubo.

Dum ekskursoj oni vizitis al Matenadaran — deponejo kaj explorejo de antikvaj manuskriptoj, *Yerevan Brendy Company* kun gustumado de armenaj konjakoj, la pagana templo de Garni, lago Sevan, fortikaĵo kaj muzeo Erebuni kaj al aliaj vidindaĵoj. La gastoj vizitis la monumenton kaj muzeon omaĝe al la armena genocido de la 1915a jaro.

Por la italaj kaj svisaj esperantistoj antaŭ IES-1 oni organizis unusemajnajn ekskursojn en la suda parto de Armenio kaj Montara Karabaĥ (Arcaĥ).

IES-2 okazos 27 jun – 3 jul 2012 en Erevano kaj Tsakhkadzor.

✉ ies-2.armenio@area.am

<http://www.area.am/>

Susanna Baghdasaryan

Unu Kongresego kun tri kongresoj

9–14 jul 2011 tri eventoj samtempe okazis en la brazila urbo San-Paŭlo — la 8a Tutamerika (TAKE), la 46a Brazila kaj la 31a Junulara kongresoj de Esperanto. Ilin organizis respektive Amerika Komisiono de UEA, Brazila Esperanto-Ligo (BEL) kaj Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO). La kongresejo lokiĝis en la instalaĵoj de Fakultatoj Sankta Marcelina (FASM).

Ne malprave la partoprenintoj nomis la renkontiĝojn Kongresego 2011. La programo enhavis ĉirkaŭ 60 erojn, kiuj etendiĝis de la 9a ĝis la 22a horo.

Pli ol 450 homoj aliĝis. Krom esperantistoj el preskaŭ ĉiuj brazilaj ŝtatoj, venis 54 personoj el naŭ Eŭropaj kaj naŭ Amerikaj landoj.

Laŭ la plimulto de la partoprenantoj, la plej alloga programero estis la Unua Esperantista Kinofestivalo, kies slogano estis “Kino sen limoj”. Ĝin kunordigis la ruso Aleksander Osincev (*intervjuata en la suba foto*). La spektantaro amuziĝis per filmoj originale parolataj en Esperanto aŭ kun subtekstoj en ĉi tiu lingvo.



Du KD-oj estis lanĉitaj kaj okazis kelkaj muzikaj prezentadoj. Kultura Kooperativo de Esperantistoj organizis prelegon por lanĉi la postmortan diskon de la kantistino Vera Jordan, kies titolo estas *Esperanto: mia pasio*. Dirce Salles dancigis la homojn, kiuj ĉeestis la prezentadon de la KD *Jen Mi*. La kantisto Tone kantis kaj instruis la brazilan milit-arton “capoeira”.

La eldona agado estis fruktodona ĉi-jare. Eldonejo Lorenz publikigis *Almanakon Lorenz 2011*. La kolombia muzikestro Alfredo Aragón prelegis pri la ĵus aperinta *Muzika Terminaro*. Paulo Sergio Viana kaj Francisco Wechsler kuntradukis kaj eldonis la libron *La sekreta kaŭzo kaj aliaj rakontoj* de la fama brazila verkisto Machado de Assis. Sebastião Pimentel prelegis pri la antaŭ nelonge publikigita libro *Jes, sinjoro! Vikto Vivas*. José Dias Pinto lanĉis *Partikularaĵojn de Blonda Knabino*. Katalin



San-Paŭlo: La televido de TAKE pretigas specialan programeron pri la Legio de Bona Volo.

Kováts disvastigis sian verkon *Stelsemantoj en la ora nordo*. Legio de Bona Volo aranĝis prelegon por diskonigi la libron *Meditadoj el la Animo* de José de Paiva Neto.

Ekumena etoso regis en la kongresejo. La monaĥinoj, kiuj zorgas pri FASM, permesis, ke la altaro de la kapelo estis respektplene kovrita per la Esperanto-flago. Tie membroj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) ĉiumatene kunordigis preĝorondojn. Tiuj samaj fratinoj deklaris, ke ili deziras lerni la Internacian Lingvon kaj ĝin enkonduki en la kadron de la lernobjektoj de tiu edukejo.

Katolikismo kaj Esperanto estis la temoj de la prelego farita de Vitor Rigotti dos Anjos. Anoj de Oomoto kunvenis. Unuafoje en Brazilo ateistoj renkontiĝis en tiuspecaj eventoj dum aranĝo estigita de Tulio Flores. Luis Jorge Santos Morales, prezidanto de Kolombia Esperanto-Asocio, paroladis pri *La Daŭra Surtera Feliĉo je Ĉies Atingo*. Spiritismaj esperantistoj festis la 120a naskiĝjaron de Ismael Gomes Braga. La lastan tagon Osmar da Silva Alves prelegis pri la mediumo Chico Xavier.

Radio Rio de Janeiro elsendis rekte el la kongresejo. Fabiano Henrique prelegis kaj omaĝis la radioparoliston Givnildo Costa pro la 25-jariĝo de la programo *Esperanto, la Lingvo de Frateco*, okazonta la 21-an de novembro.

Speciala kunveno festis la 60-an datrevenon de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. La kuban movadon pri-traktis Alberto Calienes, prezidanto de la Amerika Komisiono de UEA. La instruisto Marcio Santos estigis forumon pri la temo “Kiel marŝas nia disvastigo?” James Piton kunordigis la kunvenon de la Delegita Reto de UEA.

La 47a Brazila Esperanto-Kongreso okazos venont-jare en la urbo Taguatinga, en la ĉirkaŭaĵoj de Braziljo.

Fabiano Henrique

AEPA: Ne nur lingvo por babilado

11–16 jun 2011 en Karlovo kaj Sopot (Bulgario) okazis la 3a Internacia scienc-praktika simpozio *Apliko de Esperanto en la profesia agado* (AEPA-2011).

La simpozion inaŭguris Najden Najdenov, la urbestro de Karlovo kaj Honora Protektanto de la simpozio. Li emfazis la gravecon de Esperanto kiel lingvo por kunlaboro inter la fakularo kaj esprimis sian pozitivan rilaton al la internacia Esperanto-movado.

La simpozion partoprenis eminentaj bulgaraj kaj eksterlandaj sciencistoj kaj fakuloj. Esperanto estis la sola oficiala lingvo, sed laborlingvoj estis la naciaj lingvoj de la partoprenantoj, se ili ne estis esperantistoj; danke al la rekta tradukado nacilingvo-Esperanto-nacilingvo ĉiu partoprenanto havis eblecon prelegi kaj diskuti.

Krom aŭskulti ĝeneralajn prelegojn kaj diskutojn, oni povis partopreni fak-kunvenojn, prelegojn, diskutojn pri diversaj fakoj, ekzemple: eŭrologio, esperantologio, juro, ekologio, turismo, ekonomiko, informadiko, k. a. Prelegis, interalie, prof. H. D. Quednau, d-ro Jimmy Stryhn Meyer, prof. B. Leonov, d-ro E. Macko kaj multaj aliaj.

Dum la simpozio okazis ankaŭ Bulgara AIS-Studadesio. Sub la gvido de prof. Alicja Lewanderska-Quednau, vicrektorino de la Internacia Universitato Karlovo (IUK), estis inaŭguritaj fako pri ĵurnalistiko ĉe IUK kaj salono *Ada Fighiera-Sikorska* en IUK.

16 jun en la solena salono de la urbo-domo de Karlovo okazis festkunveno omaĝe al la 70-jara jubileo kaj 55-jara aktiva Esperanto-agado de profesoro Bojidar Leonov — prezidanto de BEA, AIS-Bulgario, TOLE, rektoro de la Internacia Universitato Karlovo.

La partopreno de eminentaj sciencistoj el la Bulgara Akademio de la sciencoj kaj el bulgaraj universitatoj kontribuis al la sukceso de la simpozio, rompinte la “tradicion”, ke Esperanto-aranĝoj estas nur por la esperantistoj. La simpozio refoje montris al la oficialaj instancoj en Bulgario, ke Esperanto estas ne nur lingvo por babilado kaj amikaj renkontiĝoj esperantistaj, sed ĝi povas kaj devas esti aplikata kiel kontaktlingvo inter la monda fakularo.

Post AEPA en Karlovo okazis ankaŭ internacia seminario *La rolo de la religio por la edukado de la juna generacio*, kiun partoprenis reprezentantoj kristanaj kaj muzulmanaj,

(Laŭ komuniko de la Estraro de BEA)

Pollando: Du gravaj eventoj

25–29 jun 2011, en la pitoreska urbo Wağrowiec okazis la 2a Grandpolia Esperanta Somero (GES-2), en kiu krom polaj esperantistoj partoprenis gastoj el Germanio, Hungario, Italio, Serbio kaj Ĉinio.

Dum la unua tago la aranĝon honoris per sia ĉeesto membro de Sejmo (la parlamento de Pollando) Tadeusz Tomaszewski, kiu tralegis salutleteron de la vicprezidanto de Sejmo, Jerzy Wenderlich, la Alta Protektanto de GES.

Dum la diskutado Tomaszewski sugestis, ke en Sejmo eblas kaj indas krei Parlamentanan Klubon de Esperanto-amikoj, kiu helpos disvastigi Esperanton en la parlamento kaj en Pollando en kunlaboro, interalie, kun la Pola sekcio de Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE).

La Pola Sekcio de EDE (EDE-PL) formiĝis surbaze de la iniciata grupo “Esperanto por EU”, likvidita por ke ĝiajn taskojn transprenu jam pli multaj membroj de EDE-PL.

Kun reprezentantoj de la Eŭropa Federacio de EDE, d-ro Eŭgeno Macko (vicprezidanto de EDE-Federacio) kaj d-ro Blazio Wacha (prezidanto de EDE-HU) ni diskutis eblecojn de agado sur la Eŭropa politika scenejo kaj de disvastigo de Esperanto en Eŭropo.

Dum GES-2, krom la politikaj, okazis ankaŭ la kultur-turismaj aranĝoj. Pastro Stanislao Stolc celebris en la loka preĝejo la Sanktan Meson en Esperanto, dum kiu, loka koruso kantis la himnon de Eŭropo pole kaj Esperante kaj poste religiajn kantojn en Esperanto.

La itala kantisto Manuêlo Rovere kaj

Malborko: Etsuo Miyoshi (sidanta) kun ordeno apud la memorŝtono “Etsuo Miyoshi”.



la ĉinino Fan Qiu Ju en la urba biblioteko prezentis koncerton en Esperanto. Ĝin ĉeestis la vicurbestro de Wağrowiec, Grzegorz Kamiński, kiu post la koncerto en la nomo de la urbestro, Stanisław Wilczyński, invitis ĉiujn al komuna manĝo en la plej bona urba hotelo.

30 jun la partoprenantoj forveturis al Malborko por grava evento en la Parko de la Mondo, kie tiutage oni inaŭguris du Esperanto-memorŝtonojn.

La unua ŝtono memorigas la japanan propagandiston kaj mecenaton de Esperanto Etsuo Miyoshi. Etsuo Miyoshi, laŭ la iniciato de Kazimiro Krzyżak, kun la apogo de lokaj aŭtoritatoj kaj de la ministro de eksterlandaj aferoj Radosław Sikorski, estis distingita de la prezidento de Pollando Bronisław Komorowski per Kavalira Kruco de Meritordeno por Respubliko Pollando pro grandaj meritoj por promociado de la pola kulturo kaj de la internacia lingvo Esperanto. La ordenon al Etsuo Miyoshi donis la vicvojevo de Pomerio, Michał Owczarczak.

La Esperanto-ŝtonon Kaŝubio, donacitan de la prezidanto de EDE-PL, Franciszek Witucki, malkovris kaŝuba delegacio sub la gvido de la vojevodo de Pomerio Roman Zaborowski.

Post muzika parto Kazimiro Krzyżak kaj Eduardo Kozyra enmanigis al kelkaj politikistoj kaj aŭtoritatoj skribajn dank-esprimojn. Pastro Stanislao Stolc celebris la Sanktan Meson en Esperanto kaj aspergis apud la preĝejo la Esperantomemorŝtonon Vatikano, kiu memorigas la papon Johano Paŭlo II. Pri la evento raportis lokaj kaj regionaj gazetoj, Malborka Televido kaj Radio Gdańsk.

EDE-PL

En la Esperanto-urbo Herzberg

Komence de julio estis festata la kvinjara jubileo de la oficiala nomumo de Herzberg am Harz kiel la Esperanto-urbo. La festo kulminis 12 jul en la kavalira salono de la Kastelo en ĉeesto de gravuloj de la politiko, urba administracio kaj Esperanto-movado. Esperanto-torto estis speciale bakita.

Kunlaborantoj, amikoj, klubanoj de Interkultura Centro Herzberg partoprenis la tradician procesion dum la Pentekosta popolfesto en la Esperanto-urbo Herzberg. La Esperanto-grupo kun flagoj, ombreloj, ktp. inter multaj aliaj kluboj, asocioj, muzikistoj, estis laŭte anoncita, bele prezentita de la organizantoj kaj vigle salutata de lokuloj laŭ la marŝvojo tra la urbo. Esperantistoj partoprenis ankaŭ la tradician urban feston, dum kiu la urbestro proklamis novan reĝon, reĝinon kaj reĝidon de la urbo.

En tri lernejoj dekoj da lernantoj konatiĝis kun Esperanto kaj lernis la lingvon fakultative kun la instruistoj Zsófia Kóródy, Otto Kern kaj Ewa Kukielka. Pluraj diverslandaj vizitantoj per siaj rakontoj, kulturaj informoj, vivspertoj, prezentadoj k.s. kontribuis al la lecionoj, helpis la lingvan evoluon de la lernantoj. Danke al sponsoroj kvar lernantoj partoprenis en la Infana Kongreseto en Danlando.

Universitataj studentinoj el Göttingen, kiuj pretigas disertajon “Kiel aspektos Herzberg en la jaro 2020?”, vizitis la Esperanto-Centron por interparoli kun Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy pri la evoluo de Esperanto-urbo.

La familio Schicke ĉi-somere malfermis *Esperanto-Café* en la ĉefstrato de Herzberg. La kafejo havas manĝokarton kaj ŝildon en Esperanto, kaj proponas, interalie, ginsengan teon kaj specialajn trinkaĵojn.

La irandevana esperantisto Amir Javadi, iama posedanto de *Esperanto-Paradizo* en Vieno, ekloĝis en Herzberg kaj aĉetis tie la hotelon *Goldener Hirsch* kaj komencis renovigi ĝin por krei la Mondan Pac-Centron.

La familioj Liberski (Poznano) kaj Khan (Varsovio) aĉetis en Herzberg-Sieber la tristelan hotelon *Zum Pass*. Teresa Liberska jam kelkajn monatojn loĝas en Herzberg kaj helpas la lernejan instruadon kaj agadas kiel administranto por ILEI.

Tri pliaj Esperanto-entreprenistoj planas fondi firmaetojn kaj komenci ion novan en la Esperanto-urbo.



Herzberg: La jubilea Esperanto-torto.

Hamburga Somero 2011

Per somera festo en salono de la kulturbutiko (Kulturladen St. Georg) finiĝis Esperanto-semajno (16–23 jul) kun prelegoj kaj ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Hamburgo. La partoprenantoj de la Hamburga Somero venis el Belgio, Francio, Japanio, Kroatio, Ruslando kaj kompreneble el Germanio.

La ĝenerala temo de la prelegoj estis ekologia vivmaniero. Ankaŭ la interparoloj inter la partoprenantoj ofte havis la temon, kiel vivi konscia pri la medio. Dum la ekskursoj ni uzis publikan trafikon.

Hamburgo, kiu estas Eŭropa Verda Ĉefurbo en 2011, ebligis al ni sperti pri la multaj manieroj de komforta moderna vivo en harmonio kun integra naturo. Saĝa uzado de energio estos la plej grava elemento de estonteco. Ĉiuj partoprenantoj lernis ion novan por sia vivo.

Benno Klehr

Münster: La prezidanto de GEA Rudolf Fischer (dekstre) gratulas al Helmut Klünder, nova honora membro de GEA. (Fotis: Hedwig Fischer)



GEA celas allogi eksterlandanojn

Germana Esperanto-Asocio (GEA) dum la lastaj jaroj invitis najbarajn Esperanto-asociojn al komunaj kongresoj en Germanujo. Ĉi-jare dum Pentekosto, 10–13 jun, okazis la 88a Germana Esperanto-Kongreso kune kun Esperanto Nederland en la nordokcidenta urbo Münster. Tiu koncepto denove estis plena sukceso.

Entute 139 aliĝintoj el 11 landoj kaj pliaj tagaj gastoj spertis varian programon ekster la necesaj laborkunsidoj de GEA kaj ĝiaj lokaj, federaci-landaj kaj fakaj ligoj. Kongreso el vidpunkto de GEA estu samtempe ankaŭ distra ferio-aranĝo, en kies kadro ĉiu povu elekti, kio al li plaĉas.

Altan kulturan nivelon estigis la vespera muzikprogramo kaj serio da fakprelegoj, precipe pri la kulturo de Nederlando kaj de la najbara nordokcident-Germana regiono. Montriĝis, ke la Nederlandaj gastoj sentis sin lingve pli hejme ol kelkaj Germanoj, ĉar ofte oni aŭdis la platdiĉan lingvon, ekzemple en koncerto de la *Dorskorbuloj*, konataj figuroj el la loka kulturo. Ekskursoj gvidis al la loĝlokoj de Annette von Droste Hülshoff, la plej fama poetino de Germanujo, al naturrezervejo kaj al la urbo-centro de Münster, en kies urbodomo en 1648 naskiĝis la Nederlanda ŝtato.

Tute nova estis “ludotago” dum la Pentekosta dimanĉo. Malgranda firmao, simpatianta kun Esperanto, invitis kongresanojn al budoj kun plej diversaj ludoj. Tre laŭdata estis ankaŭ la kongresa busbileto, per kiu la kongresanoj senpage uzis ĉiujn urbajn trafikilojn. Fine ne mankis la fama etoso, kiam renkontiĝis la samideanoj post la vespera programo en la kela “knajpo”, hejmeca trinkejo, por babile senstreĉiĝi. La kongresejo, en kiu oni ankaŭ dormis kaj manĝis, perfekte taŭgis. La Loka Kongresa Komitato de Münster ricevis multajn laŭdojn por la elstara organizado.

La kongreso alportis ankaŭ movadajn fruktojn. GEA decidis pri tute nova regularo por finance subteni siajn federaci-landajn ligojn kaj lokajn grupojn. Eĉ de internacia graveco eble estos la “Sunmontaj Gvidlinioj”, platformo por la Eŭropa aktivado de GEA, preparita de laborgrupo de spertuloj.

Resume: la 88a Germana Esperanto-Kongreso estis ankaŭ bona reklamo por la aranĝoj de GEA. Espereble venontjare en Berlin la partoprenantaro de eksterlando estos ankoraŭ pli altnombra.

Voko

ICH



“Bonaj ideoj venkos”

1–5 jun 2011 okazis en Dresdno la 33a Germana Evangelia Eklezia Foiro. Prezenti sin tie per informstano Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj la partio Unu Mondo.

La stando de GEJ ne estis aparte bone preparita, sed ĝi estis prizorgata de teamo el sep simpatiaj gejunuloj, kiuj sukcesis venigi entute multajn dekojn da junaj partoprenantoj al ĉiutagaj lingvo-kursetoj sur apuda herbejo.

Ĉe la stando de Unu Mondo okazis abundaj diskutoj pri evolua kunlaboro, tutmonda demokratio, justa komerco kaj pri Esperanto. Ŝajnas, ke la stando estis ofte eĉ pli vizitata ol tiu de la kristandemokratoj. 400 homoj partoprenis en enketo, kiamaniere akiri financajn rimedojn por plenumi la promeson altigi la elspezojn por evolua kunlaboro al 0,7% de la malneta socia produkto, kaj 101 subskribis la rezolucion “Certigi pacon per tutmonda demokratio”. Ni disdonis pli ol 2 mil speciale preparitajn flugfoliojn. Abundis kuraĝigoj (ekzemple: “Bonaj ideoj venkos” — tion esperantistoj nuntempe tre malofte aŭdas). Du vizitantoj deklaris sian membriĝon en la germana sekcio de Unu Mondo.

Ulrich Matthias

INA jubileis en Herzberg

La Esperanto-urbo Herzberg 30 jul – 6 aŭg 2011 gastigis konferencon de la Internacia Naturkuraca Asocio (INA) kun la ĉeftemo “Signifo de naturkuracado en la nuna mondo”. La ĉeestantojn, kiuj venis el naŭ landoj, salutis la urbestro Gerhard Walter en la urbodomo.

La konferenceto estis en Ginsengobutiko situanta ĉe la ĉefstrato de la urbo, kie je dispono de ĉiuj partoprenantoj estis bone ekipita prelegsalono kaj nove malfermita Esperanto-kafejo.

INA estis fondita en la jaro 1986, kaj ĝia ĉefa principo “obei al la leĝo de la naturo kaj helpi al la natura forto en la homa korpo” estas ŝlosilo por kuraci malsanojn. La INA-konferencojn partoprenas ne nur fakuloj, sed ankaŭ simplaj interesatoj pri alternativa kaj naturkuraca medicinoj. Pro la 25-jara jubileo de INA la konferenco estis eksterkutime riĉa, plena de prezentaĵoj, ekskursoj kaj antaŭ ĉio interesaj prelegoj de fakuloj.

Kadre de ĉi jara konferenco okazis tritaga profesia kaj praktika simpozio por german-parolantoj kuracistoj pri korea kompleksa medicino kaj sa-am akupunkturo. Ĝi arigis 20 fakulojn: medicinistojn kaj naturkuracistojn el kvin landoj. La seminarion en Esperanto gvidis d-ro Puramo Chong (Koreio) kaj germanen tradukis Harald Schicke. Esperanto kiel ponto-lingvo faciligis la komunikadon inter homoj de diversaj landoj kaj montris sian taŭgecon dum la seminario, plena de malfacilaj fakaj terminoj.

La ideo de doktoro Puramo Chong kaj Harald Schicke estas organizi similajn seminarion en Esperanto por neesperanta publiko kaj eĉ fondi en Herzberg Centron pri Orienta Medicino.

Małgosia Komarnicka

ILEI en Orienta Azio

12–15 aŭg 2011 la 1a ILEI-Seminaro en Orienta Azio (ISOA) okazis en la Tianjin-a Fremdlingva Universitato (Ĉinio) kun pli ol 70 partoprenantoj el Koreio, Japanio, Mongolio, Brazilo kaj Ĉinio, inter kiuj pli ol 30 junuloj.

Post la inaŭguro komenciĝis la laborprogramo. Unue, s-ro Lee Jungkee prelegis pri la Esperanto-kurso en Koreio kaj ĝia instrumentado. S-ino Arko faris prelegon “Ĉu azianoj povas ekparoli Esperante ene de monato?”. S-ro Wang Minghao faris prelegon “Miaj pensoj pri Esperanto-Instruado” kaj demonstris instrumentadojn kune kun s-ino Huĝimoto Ricko el Japanio. S-ro Nema el Koreio faris prelegon “Muro de vortoj, kiel transsaltu azia lernanto”. S-ro Tiekio el Japanio prelegis pri malfacilaĵoj por japanoj en la lernado de Esperanto. S-ro Li Welun el Ĉinio prezentis la temon “Esperanto-instruado en ĉinaj altlernoj”. S-ro Belmonto el Japanio prezentis esperantan Radio-Ĉerizon (<http://paramirado.com>). S-ro Zhang Changsheng el Ĉinio prezentis sian sperton pri instruado de Esperanto en diversaj lernejoj kaj pri ĝemeligado de la elementa lernejo *Dongfang* kun la japana elementa lernejo *Yosumi*. S-ro Han Zuwu el Ĉinio analizis la ĉinan lingvan nivelon, kaj montris metodon altigi ĝin. S-ino Huĝimoto Ricko el Japanio prezentis sian lernejon, kie ŝi instruas Esperanton. S-ro Miaohui, kiu estas majstro en ĉina monaĥejo, analizis la situacion de ĉina Esperanto-instruado kaj aldonis solvajn vojojn.

Dum la konferenco kunsidis la ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI. Oni decidis ke la 2a ISOA okazos paralele kun la venont-jara 45a ILEI-konferenco en Ĉinio. Oni proponis DVD-kursojn, skajpo-kunligon inter landaj ILEI-sekcioj, komunajn E-kursojn kaj kunlaboron por bone gastigi la konferencon de ILEI en Ĉinio.

Ĉe la fermo s-ro Trezoro, la sekretario de ILEI, raportis pri la sukcesa konferenco en Kopenhago, esprimis pretcon de ILEI kunlabori kun Esperantaj kaj neesperantaj personoj kaj organizoj, kaj prezentis dankajn vortojn al la kolegoj el kvin landoj.

La seminarion antaŭis la 2a somera Esperanto-kursaro kun pli ol 30 studentoj. S-ro Li Baoguo el Ĉinio kaj s-ino Natura el Koreio instruis la lingvon, kaj akademiano Laŭlum instruis historion de la Esperanta literaturo.

Trezoro, sekretario de ILEI





Esperanto por vidhandikapitoj

56 esperantistoj el 12 landoj renkontiĝis 14–21 jul 2011 en la ĉeĥa urbo Olomouc okaze de la 77a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

En la hotelo *Sigma* okazis krom la oficiala inaŭguro kaj solena fermo de la kongreso ankaŭ diversstemaj prelegoj inkluzive de la kongrestema “Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj” kaj du ĝeneralaj asembleoj de la ligo de blindaj esperantistoj (LIBE).

La kongresa programo enhavis vizitojn de historiaj memorindaĵoj de urbo Olomouc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, bierfarejo Moritz kaj ĉasista kabano en Horka nad Moravou. La Sankta Meso en Esperanto okazis en la preĝejo de Sankta Miĥaelo.

Unu tago estis dediĉita al prelego pri Karel Emanuel Macan, nestoro de la blindula Esperanto-movado; la prelego okazis en Teknika muzeo en Brno.

En la centro por helpo al blinduloj en la strato Pavlova en Olomouc la kongresanoj ricevis informojn pri subtenado de blindaj kaj malfortevigantaj homoj dum laborserĉado en distrikto Olomouc. Estis vizitebla ankaŭ vendejo de helpiloj, kiujn multaj partoprenantoj ne nur observis, sed ankaŭ aĉetis.

La celo de la kongreso estis interŝanĝo de informoj pri la nivelo de flego de blindaj kaj malfortevigantaj homoj en diversaj landoj, per ekipo de kompencaj helpiloj kaj pri forigado de barieroj. La partoprenantoj renkontiĝis kun siaj konatoj kaj ankaŭ trovis novajn kontaktojn kaj novajn amikecojn. Ili ankaŭ havis eblecon perfektigi siajn sciojn de Esperanto, kiu estas tradicia komunikilo por blinduloj de la tuta mondo jam dum pli ol cent jaroj.

Jan Přiborský

Someraj eventoj en Finnlando

Ĉi-somere Esperanto-Asocio de Finnlando okazigis du eventojn.

La semajna Esperanto-kurso post unujara paŭzo denove estis en la Popola Instituto de Valamo en la monaĥeja areo en la orienta Finnlando. Antaŭ la kurso-semajno kelkaj kursanoj vizitis la Muminmondon en la urbeto Naantali.

La kursanoj dividiĝis en elementa kaj progresanta grupo. La ĉefinstruisto estis Atilio Orellana Rojas kaj la dua instruisto, kursogvidanto Tiina Oittinen. Ambaŭ vice instruis kaj gvidis la du grupojn. Dum la libertempa programo ĉiuj kursanoj estis kune, kaj tiam ili faris, interalie, ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo sub gvido de esperantlingva ĉiĉerono Jukka Laaksonen kaj havis komunajn amuzajn vesperojn.

En la komenco de julio Esperanto-teamo partoprenis en la monda konkurso de edzinportado en la urbeto Sonkajärvi, ĉ. 25 km nord-oriente de Iisalmi en la provinco Norda Savonio. En la konkurso viro devas laŭeble rapide porti sian virinon (ne nepre edzinon) tra 250-metra kurejo kun obstakloj: bariloj kaj akvo, kiun la paro devas trapasi. La viro portas la virinon surdorse libermaniere.

Unue okazis grupa konkurso, en kiu tri viroj sinsekve portis la saman virinon. Nia grupo de hura-antaro sidis en la rigardejo kaj flirtigis la verdan flagon. La grupo estis intervjuita de loka gazeto. Nia grupa teamo estis la sepa en la konkurso. Malfeliĉe ne eblis partopreno en la ĉefa konkurso, ĉar la viro difektis sian kruran muskolon. Tamen la verda flago plu videble flirtis en la rigardejo. Niaj pensoj estas jam en ebla venontjara partopreno.

Tiina Oittinen

Festo en Aŭstralio

Okaze de la centa datreveno de la unua Aŭstralia Esperanto-kongreso la Adelajdaj esperantistoj gastigis la jubilean kongreson de AEA.

La Universitato de Adelajdo, en kiu kunvenis en 1911 la Esperanto-pioniroj, disponigis siajn ejojn al la nuna kongresano senpage. Gasto de la kongreso estis prof. Humphrey Tonkin, kies prelegoj donis al la kvante negranda Aŭstralia esperantistaro altkvalitan spiritan nutraron. Rememoroj pri la pasinteco, planado, filmprojekciado, teatrumado, instruado, koncertoj de JoMo, bankedo kaj diversaj aliaj eroj dense plenigis la semajnon inter la 9a kaj 17a de julio.

Pluraj kongresanoj vestis sin en historiaj kostumoj kaj la komuna fotado okazis en lokoj, kie fotiĝis la iama kongresano de la unua kongreso.

Katja Steele

SOMERE en kvieta valo

La 9a Somera Mezeŭropa Renkontiĝo (SOMERE) okazis 23–30 jul rande de la vilaĝeto Kirchähr en la germana regiono Westerwald, iom oriente de Koblenz. La renkontiĝejo troviĝis en kvieta valo kun arbaro, kiu permesis al ni fari kelkajn belajn promenojn; bone regalis nin la kuiristino en la domo.

Ni ekskursis al diversaj lokoj de la regiono — al Montabaur kaj ties kastelo, kaj ankaŭ al Limburg ĉe la rivero Lahn kun ties impone kolora katedralo kaj ĉarma malnova urboparto. En Koblenz kelkaj vizitis la ĝardenekspozicion, dum la aliaj promenis tra la urbo apud Rejno kaj Mozelo. En alia ekskurso ni veturis al la urbetoj Nassau kaj al la malnova baneja kuraĉloko Bad Ems, kiun vizitadis interalie Ruslanda caro kaj aliaj Ruslandaj famuloj en la 19-a jarcento. Surprizo estis vidi en germana urbeto rusortodoksan preĝejon.

Endome ni sekvis plurajn prelegojn. Christian Declerck prelegis pri la lingvo-uzo, Danka Leyk klarigis al ni, kiel funkcias psikologia grupo, Lu Wunsch-Rolshoven informis pri kelkaj principoj de varbado kaj pri la difuzo de novaj aferoj. Okazis ankaŭ lingvokurso. Kaj kompreneble ni ĝuis babiladon, ludadon kaj puzladon — ĉi-foje ni havis ne nur tridimensian puzlon, sed sukcesis ankaŭ kunmeti duflankan puzlon, kun la sama bildo supre kiel malsupre; iom streĉe, sed des pli kontentige.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

BET-47: Folkloro tra jarcentoj

La 47aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-47) okazis 9–16 jul 2011 en la Latvia vilaĝo Mālpils, je 60 kilometroj sud-oriente de Rigo. En la Profesia mezlernejo de Mālpils, kiu akceptis BETon, kunvenis 116 partoprenantoj el 14 landoj.

Dum BET oni povis viziti paroligan kurson, kiun majstre gvidis Nina Pietuchowska (Pollando), komencantojn pri Esperanto ekinteresis kaj laŭ Cseh-metodo instruis Tuomo Grundström (Finnlando), kurso de la latva lingvo gvidata de Biruta Rozenfelde altiris intereson de multaj BET-anoj.

Tradicie funkciis Somera Universitato, kie oni prelegis pri Esperanto-turismo, futurologio, projekto Komputeko, E@I ĝenerale, pri Nacia parko en Jeloustono kaj eĉ montris ĉielon en virtuala planetario. Ĉar la temo de BET-47 estis *Folkloro tra jarcentoj*, oni povis aŭskulti latvajn fabelojn, legendojn, popolajn kantojn kaj rakontojn pri ilia kolektado, pri la konata latva Esperanto-vortaristo Eduards Jaunvalks kaj liaj tradukoj de latvaj popolkantoj, konatiĝi kun la malnova latva jarciklo kaj ekscii kiel folkloro konstruis naciojn.

Krome okazis kvizoj kaj ludoj, kolektiĝis rondeto de rakontantoj kaj la unuan fojon en historio de BET-oj estis organizita aŭkcio. Diservon en Esperanto gvidis katolikaj pastroj Māris Laureckis (Latvio) kaj Marius Dyglis (Litovio).

Dum BET-47 oni ekskursis tra vilaĝo Mālpils, vizitis ankaŭ Mālpils bienon. Tuttaga ekskurso okazis al urbo Sigulda en la tiel nomata “Svislando de Vidzeme” — pitoreska ĉirkaŭaĵo de antikva valo de la rivero Gauja, unu el la plej belaj kaj popularaj turismaj lokoj en Baltio. Poste oni vizitis la Muzeon-naturparkon de Turaida, kastelon de la liva reĝo Kaupo, tombon de Turaida Rozo. Fine de la ekskursita tago oni vizitis fortikigitan 9–10-jarcentan vilaĝon de latgaloj en Āraiši sur laga insulo.

Dum vesperoj okazis koncertoj de folkloraj ensembloj de Mālpils, folkloro grupo *Muzikistoj de Maskačka* el Rigo, konata Esperanto-kantistino Austra Pumpure kaj ensemblo *Animo* el Liepāja. Partoprenantoj de BET-47 multe kantis, dancis kaj eĉ kune kun folkloro grupo festis Johanfeston laŭ antikvaj latvaj tradicioj.

La ĉiutaga informilo de BET-47 respegulis la aktualan programon, raportis pri okazintaĵoj, publikigis opiniojn de

partoprenantoj. Oni konkludis, ke BET-47 estis bone organizita, interesa, kaj donis eblecon konatiĝi kun la latva kulturo kaj sincere kontakti inter reprezentantoj de diversaj landoj, popoloj, lingvoj kaj kulturoj.

Margarita Želve



Je la Tago de la suno

Esperanto-societo *Sukceso* (Vraca, Bulgario) organizis renkontiĝon en la monaĥejo Sankta Profeto Ilija ĉe la vilaĝo Strupec (diocezo de Vraca), la 24–26an de junio 2011, okaze de la Tago de la suno, akvo kaj kuracaj plantoj laŭ la popolkalendaro. Pri kuracaj plantoj kaj ties utiligo por prevento de malsanoj, produktado de medikamentoj kaj memkuracado prelegis Ivan Uzunov.

La 24a de junio estas ankaŭ grava festo laŭ la eklezia kalendaro. Pri tio memorigis abato Pimen en sia prediko pri la naskiĝtago de Johano la Baptisto. La meson ĉeestis trideko da esperantistoj el tuta Bulgario.

Dum la tri tagoj en la monaĥejo korto pendis la Esperanta flago: la prezento de diversaj Esperanto-periodaĵoj, gvidata de Ljubomir Trifonĉovski, la ĉefredaktoro de *Literatura Foiro*, evoluis al diskuto pri la stato kaj perspektivo de la Esperanto-gazetaro.

La programo de la renkontiĝo inkluzivis ankaŭ prezenton de multaj bildoj el Kenjo fare de Raja Androvska kaj prezenton de la historio de la monaĥejo fare de Sneĵinka Angelova. La bulgara verkisto kaj esperantisto Cvetan Lalov legis verkojn el siaj sep porinfanaj libroj.

Ljubomir Trifonĉovski



Spiritaj tradicioj kaj Esperanto

“Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto” estas la titolo de la nova ekspozicio, malfermita en Esperanto-Muzeo en Svitavy (Ĉeĥio), kadre de la Muzea nokto la 4an de junio 2011.

Dum la inaŭguro oni aŭskultis ĉeĥe kaj Esperante deklamon de la ĉapitro *Pri Kredo* el la libro *La Profeto* de la libana verkisto Ĥalil Ĝibran kaj spektis video-prezentadon. Post kantado de mantraj en sanskrito kaj Esperanto, Petro Chrdle prelegis pri “Spiriteco de Fora Oriento laŭ vidpunkto de vojaĝisto”.

Estis projekciataj mallongaj filmoj rilataj al la ekspozicia ĉeftemo. Dum la fina komuna kantado alternis sanktaj adorkantoj kaj mantraj de diversaj spiritaj tradicioj en la ĉeĥa, hispana, hebrea, araba, sanskrito kaj Esperanto.

La nova ekspozicio celas prezenti la Esperanto-movadon plurisma, ideo malferma kaj aktive tolerema, eliranta el la koncepto de la homaranismo de Zamenhof.

La ĉefa devizo de la ekspozicio estas: “La vero estas libro, kiun neniu el ni ankoraŭ finlegis”. Ĝi ne estas esprimo de troa relativeco de valoroj, sed konscio pri nia natura homa limigiteco dum kontemplado pri esenco kaj senco de nia vivo, preteco daŭre serĉi, aŭskulti, lerni unu de alia, havi reciprokajn estimon kaj respekton al alikredanoj kaj koncentriĝi ĉefe pri tiuj pensoj kaj valoroj, precipe tiuj de agema amo kaj reciproka afableco, kiuj unuopajn instruojn unuigas.

La paneloj konatigas la vizitantojn kun tiuj religiaj kaj spiritaj instruoj kaj movadoj, kiuj havas en Esperantomovado sian reprezentigon. Krom diversaj branĉoj de kristanismo estas reprezentitaj unitarismo kaj unitara universalismo, bahaismo, spiritismo, budhismo kaj ŭonbulismo, Oomoto kaj Kosmologio de Martinus.

En librovitroj estas prezentataj ekzemploj de riĉa eldona agado de Esperanto-organizoj pri la spiritaj temoj. Krome, en la aktualigita konstanta ekspozicio pri Esperanto estas kreita nova panelo *Filantropio kaj Esperanto*, kie oni povas ekscii pli multe pri la rotaria movado kaj pri Legio de Bona Volo.

Ni elkore invitas vin al la ekspozicio, kiu funkcios dum unu jaro. Pliajn informojn legu en www.svitavy.cz, la oficiala urba retejo funkcia ankaŭ esperante.

Pavla Dvořáková

Sur la maldekstra foto estas kantado de mantraj en la Esperanto-muzeo en Svitavy.

Unufraze

★ Kadre de la programo “Citizenship”, la Eŭropa Komisiono decidis financi 35 projektojn (el 664 proponitaj), inter kiuj estas la projekto de EEU “Kiel aspektus Eŭropo se EU ne ekzistus”, kies ĉefa okazaĵo estos tritaga konferenco en Triesto por ĵurnalistoj, studentoj de ĵurnalismo k civitanaj organizoj. (*Eŭropa Bulteno*)

★ Ilona Koutny, kiel reprezentanto de UEA, prezentis la agadon de E-instruistoj en la 4a internacia konferenco de la Asocio de Lingvotestistoj (ALTE), okazinta 7-9 jul 2011 en la Jagelona Universitato en Krakovo. (Edukado.net)

★ 19-21 jun 2011 reto de eŭropaj universitatoj EUNoM organizis en Koper (Slovenio) konferencon “Multlingvaj kaj multetnaj socioj kaj institucioj”, en kiu partoprenis Kristin Tytgat k Zlatko Tišljar. (*Eŭropa Bulteno*)

★ Edward Kozyra estas inter la 20 kandidatoj, ĉiuj malborkanoj, por la titolo *La homo de la lasta jardudeko*, atribuita de *Gazeta Malborska*. (EDE-PL)

★ Kadre de la projekto “Esperanto por la publiko”, kunordigata de Evandro Caboclo, en la okcidenta kvartalo Vila Aliança de Rio-de-Ĵanejro oni metis E-propagandafiŝon en gazetbudo. (Fabiano Henrique)

★ La Asembleo de Eŭropa E-Unio en Kopenhago, kiun partoprenis reprezentantoj de 15 landaj asocioj de EU, elektis novan estraron de EEU por trijara periodo: prezidanto Sean Ó Riain; vicprezidanto Flory Witdoeck; sekretario Zlatko Tišljar; membroj Peter Baláž k Nikola Rašić. (Vikinga Voĉo)

★ La Estraro de UEA decidis, ke la 98a UK en 2013 okazos en Rejkjaviko, 36 jarojn post la antaŭa UK en la Islanda ĉefurbo. (GK UEA)

★ En la Kopenhaga UK post la demisio de prof. Sachs, plenmerita ĉefa aganto de la Internacia Sciencista E-Asocio, estis elektita pli juna estraro kun José Antonio Vergara, kiel la prezidanto de ISAE. (Vikinga Voĉo).

★ La Komitato de UEA elektis en Kopenhago tri novajn Honorajn Membrojn de UEA: Detlev Blanke, Renato Corsetti, Rob Moerbeek. (GK UEA)

★ La Subvencio Cigno, kun valoro 500 mil enoj (ĉ. 4500 eŭroj) ĉi-jare estas dividita inter tri ricevantoj: Fondaĵo Ameriko, E-filmfestivalo en la 8a TAKE, Dokumenta E-Centro en Zagrebo. (GK UEA)

Ĉeboksary atendas vin

La Rusia Esperantista Kongreso (REK) okazos ĉi-jare la 20–23an de oktobro en Ĉeboksary, Ĉuvaŝio.

Programo: la programo komenciĝos ĵaŭde posttagmanĝe (vizitoj al muzeoj kaj pieda promeno). Vendrede okazos 2-hora busa ekskurso (pagenda aparte, la kosto ĉ. 300 rubloj), du lingv(istik)aj aranĝoj kaj koncerto. Sabate kaj dimanĉe okazos konferenco de REU (matene) kaj Lingva Festivalo (LF, tage). Sabate vespere okazos koncerto. La programo finiĝos dimanĉe ĉ. 16:00.

Aliĝkotizo: partoprenantoj, kiuj sendis aliĝilon sed ne pagis sian kotizon, surloke devos pagi laŭ la plej alta kategorio. La kotizo inkluzivas partoprenon en REK kaj en LF.

Lokoj: programeroj okazos en variaj lokoj, tamen plejparte en ĉambroj de fakultato de fremdaj lingvoj de la Pedagogia Universitato.

Loĝo: en urbaj hoteloj (ekde 2000 rubloj/tage) kaj en junulara komunloĝejo (malluksaj kondiĉoj, ĉ. 300 rubloj/tage). Por havi garantiitan lokon oni devas averti pri preferata loĝvarianto antaŭ la 1a de septembro.

Manĝoj: vespere la 21an kaj 22an de oktobro oni veturigos partoprenantojn al kafeterio, kie oni povos kune manĝi (kontraŭ pago). Alitempe oni zorgu pri siaj manĝoj mem.

Transportado: oni renkontos la trajnon el Moskvo la 20an de oktobro (alventempo 09:11). Krome vespere la 21an kaj 22an de oktobro oni senpage veturigos partoprenantojn al la kafeterio.

Kontaktoj: kongreso@reu.ru aŭ privataj adresoj de la organizantoj. Ĉiuj aliĝintoj ricevos retpoŝte informleteron kun ĉiuj adresoj, pli ĝustaj prezoj kaj programo. Krome ĝi estos publikigita en la retejo de REU kaj en dissendolisto REU-agado.



RA plena de suno

Renkontiĝo de Amikoj (RA), tradicia aranĝo de la Novosibirska E-klubo, okazis ĉi-somere en Krimeo (Ukrainio) kun 56 personoj el tri landoj. RA okazis jam la sesan fojon, ĉi-foje fore de Siberio, kie ĝi naskiĝis. Sed kial ne? Ja por siberianoj estas grave ekhavi pli da suno.

Kaj ni estis vere plenaj de suno, suno en la ĉielo, suno sur niaj T-ĉemizoj, ankaŭ la etoso estis suna: varma kaj agrabla. Tamen ĉiumatene ni kuris ne al maro, sed al kurso. Funkciis tri kursoj (por infanoj, komencantoj, kaj progresantoj), kiujn gvidis Anĵela Belenko, Lena Ŝaravina kaj Katerina Arbekova.

Esperanto-kantojn instruis Vladislav Bondarkov el Kievo. Vespere okazis koncertoj, poezia, teatra kaj luda vesperoj, konkursoj. En la teatra vespero jaltanoj (Ukrainio) prezentis du teatraĵojn. Ĉiu tago estis dediĉita al io. Ekzemple, en la tago de amo ĉiu partoprenanto havis sekretan amikon, por kiu li faris ion agrablan. Ĉiuj ŝatis ĉi tiun tagon, ĉar vere estis tre agrable dum la tuta tago ricevi donacetojn, aŭdi komplimentojn kaj reciproke fari agrablaĵojn por aliaj.

Ĉi-foje ni okazigis du konkursojn, por viroj kaj por virinoj: ni serĉis la Sinjoron kaj Sinjorinon de Tarĥankut — tiel oni nomas tiun parton de Krimeo kie ni esperantumis. Jen la gajnintoj: Nina Kovaljova el Krasnojarsko kaj Sergej Jermolin el Petrozavodsko. Dum la unuaj tri tagoj ni ludis “la lastan heroon”. Evidentiĝis, ke la plej sportema, brava kaj inteligenta inter la partoprenantoj estas la moskvanino Aleksandra Fedenko. Trejnisto pri karate, ŝi venigis al RA grupon da siaj lernantoj, por ke tiuj lernu Esperanton. La geknaboj lernis tre diligente kaj progresis pli rapide ol la simila grupo de komencantoj-plenkreskuloj. Ili multe kantis kun Vladislav Bondarkov kaj senĉese ludis Esperanto-ludojn.

Sed la maro logis nin kaj ni naĝis, kaj ekskursis al diversaj lokoj por naĝi. Bona ekskurso estis al la glora urbo Sebastopolo: panoramo de la Krimea milito, ŝiparo, mar-promeno en ŝipejoj... Dek tagoj pasis tre rapide...

Ni jam havas novajn planojn. RA estas ege moviĝema, sekvont-jare ĝi revenos al oriento. Ni decidis okazigi la sepan renkontiĝon denove apud la lago Bajkalo. Serĉu informojn en nia retpaĝo: www.ra.nsk.ru

Katerina Arbekova

Foto: lernantoj el Moskvo kun sia trejnisto A. Fedenko kaj la gitaristo V. Bondarkov.

En NASK-42 oni ne nur studis: De maldekstre: Vicky Crickett,, Kinen Carvala kaj Thomas Rusch esploras la marbordon ĉe la golfeto La Jolla Cove. (Fotis Ana Velitchkova)

Intensa NASK en Kalifornio

Tri semajnoj da lernado en nur sep tagoj! Ĉu eblas? Tio estis la defio por la 42a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK), kiu okazis la kvinan fojon ĉe la Universitato de Kalifornio, en San Diego la 2–10an de julio ĉi-somere.

Trideko da partoprenantoj el dek usonaj ŝtatoj kaj el ses aliaj landoj diligente provis lerni tiom, kiom eblis en tiu mallonga periodo. (La plej longan vojaĝon faris lernanto, kiu venis el Kazahujo!) La kursaro aperis en mallonga formo kiel provo allogi pli da studentoj kaj malaltigi la kostojn por la partoprenantoj.

La klasanoj frekventis formalajn lecionojn matene kaj neformalajn programojn posttagmeze kaj vespere. Ili spertis diversajn grup-agadojn, prezentojn, ludojn kaj ekskursojn. Aparte interesaj estis la prezentoj pri la hejmlandoj kaj ŝtatoj de la lernantoj.

La vizitantoj Gilda Muñoz Bonilla el Meksiko kaj la nova prezidanto de Esperanto-USA Orlando Raola aldonis iom da ŝanĝo en la rutino per siaj prezentoj. Eĉ la kutima feria tago, la 4an de julio — la tago de la sendependeco de Usono — estis studtago. Tiun tagon ĉiuj sidis en klasĉambroj en la mateno, sed poste ĉiuj sidis aŭ staris apud klifo aŭ sur alta konstruaĵo en la vespero por spekti la pireteknikaĵojn de la najbaraj urbetoj.

La plaĉa vetero de la San-Diega regiono permesis vizitojn dum la semajno al la apuda plaĝo kaj al aliaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo.

La intensa studado finiĝis per festeto la lastan tagon. Krom la manĝetoj kaj trinkaĵoj aŭdiĝis muziko kaj babilado, multe da babilado. Oni povis aŭdi, ke multege da lernado ja okazis dum tiu mallonga periodo.

Ĉi tio rezultis danke al la tri senlacaj instruistoj: Bertilo Wennergren (Svedujo/Germanujo), Birke Dockhorn (Germanujo) kaj Lee Miller (Usono), la helpinstruisto kaj redaktoro de la *NASKa Fasko* Hoss Firooznia, profesoro de lingvistiko ĉe UCSD Grant Goodall, kaj lokano Mar Cardenas.

Ellen M. Eddy,
Administranto de NASK-2011



La dua IJL sukcesa kaj daŭrigota

La Dua Internacia Junulara Lingvo-Tendaro (2a IJL) okazis 3–10 jul en Jászberény, Hungario, proksime al la ĉefurbo Budapeŝto.

Ĉiumatene je la 7a horo sonis la kanto *Gumaj ursetoj*, la himno de tendaro, kun regula fajfado. La fajfilo estis en la buŝo de Johano Nagy, kiu tiamaniere invitis ĉiujn por gimnastiki.

Post la bongusta kaj abunda matenmanĝo komenciĝis instruado kaj praktikado de Esperanto. La hispano Rafaelo Mateos gvidis la lernemulojn, kiuj komencis penetri en misterojn de la internacia lingvo, kaj poluris la lingvoscion de la progresantoj en ekstera konversaciejo. La antaŭtagmezoj daŭris simile dum la tuta semajno. Tagmeze ni povis gustumi la hungarecajn manĝaĵojn, kiuj inde gajnis ĉies plaĉon.

Posttagmeze ni ekskursis. Ni vizitis la bestan kaj botanikan ĝardenon, la urbon Jászberény. La varmo instigis nin plonĝi en la malvarmetan akvon de enurba strando. Ĉiuvespere interesaj interparoladoj, karaokeoj, rostado de lardo metis la kronon sur la tagon.

Sabate de la posttagmezo ĝis la malfrua vespero ni vizitis festivalon en Jászberény. Rok-bando muzikis, laŭepoke vestitaj dancistoj dancis. La etoso obsedis ĉiujn, ne ekzistis piedoj, kiuj povus resti surloke.

La lokanoj ne povis krokodili, ĉar ni havis tendaranojn el Ruslando, Kroatio kaj Hispanio. Honoris nin per sia ĉeesto Stefan MacGill, la prezidanto de ILEI.

Ferenc Harnyos

Harbino: junuloj denove kunvenis

La 3a Junulara Esperanto-Seminario okazis 28–29 maj 2011 en la urbo Harbino, Nordorienta Ĉinio kun la ĉeftemo “Esperanto kaj Junulo”. Ĉirkaŭ 40 ĉeestantoj el Ĉinio kaj Mongolio, plejparte gejunuloj, esprimis unuaniman opinion, ke la junaj esperantistoj estas la elito de la Esperanto-movado. Nun en la movado ĝenerale mankas la junulara engaĝo, tial ni memvole vigligu la agadon de gejunuloj en la movado.

La partoprenantoj alvokis okazigi Esperanto-kursojn en universitatoj, kiuj havas taŭgajn kondiĉojn, kaj per amuzaj aranĝoj gajni bonan instruan efikon.

Malnovaj samideanoj laŭeble helpu okazigon de kursoj por gejunuloj, kreu harmonian kaj unuigatan etoson inter samideanoj.

En la esperanta instruado ni emfazu la bonan tradicion de la Esperanto-movado, en kiu unu alian estimas, faras ĉion ŝpare kaj interhelpas.

La kvara seminario okazos en majo 2012.

Song Ping



Eŭropo falanta

de Dafydd ab Iago

En ĉi tiu aŭgusto estas malfacile pensi, ke Eŭropo sukcesas en sia misio. La daŭraj financaj problemoj de la Eŭropa Unio (EU) kaj ties mono, la eŭro, montras, kiom fragila estas la fundamento de EU.

En Hispanio la ŝtato pli kaj pli malfacile pagas bazajn servojn. Eĉ malsanaj pensiuloj devas multe atendi, foje dum monatoj, por ricevi bazajn pagojn. Ĉie en Hispanio la lokaj kaj regionaj administracioj ŝuldas nekredablajn sumojn kaj foje tutsimple ne pagas kontraktitajn servojn kaj produktojn.

La situacio en Hispanio estas, kompreneble, simila al la situacio en Greklando, Irlando, Portugalio kaj Italio. Sed tio ne plu estas problemo de tiel nomataj *periferiaj* ŝtatoj. Nun oni pli ofte parolas pri la ŝtatŝuldaĵaj problemoj en Belgio kaj eĉ en Francio.

Aliflanke, estas kvazaŭ komedio vidi, kiom malrapide reagis Eŭropaj ĉefoj al la financaj minacoj. Kiom da pintkunvenoj en Bruselo produktis “solvojn”, kiuj poste ne plu altiras la avarajn merkatojn?



Guy Verhofstadt diras pri EU-estroj: “Tro malmulte, tro malfrue”.

Plej grave, estas la maljusteco malantaŭ la nuna krizo. Por solvi la financajn problemojn de bankoj, Eŭropaj ŝtatoj elspezis enormajn sumojn kaj endanĝerigis siajn kredit-reputacion kaj solventecon. Monatojn poste komenciĝis la tranĉoj en publikaj servoj.

Eble la britoj, svedoj kaj danoj ĝojas pro tio, ke ili ne enkondukis la eŭron. Tamen ne estas problemo de la mono, sed de ŝtatoj kiuj malŝparis enormajn sumojn por savi bankojn kaj poste tro malrapide reagis al la kruela merkato.

En Bruselo oni nur esperas ke iam venos adekvata respondo de EU-estroj.

“La eŭro estas la fundamento de nia ekonomia sukceso kaj la simbolo de la politika unuiĝo de nia kontinento”, — konstatis, meze de aŭgusto la germana ĉefministro Angela Merkel kune kun sia franca kolego Nicolas Sarkozy. “Ĝi reprezentas la deziron de Eŭropo fortigi sian evoluon kaj respondi kune al defioj de nia tempo”, — daŭrigis la du politikistoj en komuna letero.

Kelkajn horojn poste, la eksa ĉefministro de Belgio Guy Verhofstadt kritikis Merkel kaj Sarkozy. Verhofstadt rimarkigis, ke merkato jam negative reagis al la timidaj reformideoj de Sarkozy kaj Merkel. “Kiam la Eŭropaj ĉefoj komprenos, ke ili daŭre faras la samajn erarojn, reagante tro malmulte kaj tro malfrue? — diris Verhofstadt, kiu estas ĉefo de la liberala grupo en la Eŭropa Parlamento. — Grandega paŝo al federala Unio estas bezonata, se oni devas savi la eŭron”.

Studi per Esperanto en Bulgario

Internacia Universitato Karlovo (IUK) akceptas studentojn kaj specialiĝantojn por la studjaro 2011/2012.

La studado estas ĉiutaga/ĉeesta (jarkotizo 400 eŭroj) kaj reta/eksterĉeesta (jarkotizo 250 eŭroj), universitatnivela, surbaze de la studprogramoj de bulgaraj universitatoj kaj la Regularo de AIS. La oficiala studlingvo estas Esperanto.

La plej diligentaj studentoj ricevos stipendiojn. En la komenco de la studado/specialiĝo ĉiu studento/specialiĝanto surbaze de la studprogramo studos Esperanton (se ne parolas la lingvon) kaj senpage la bulgaran lingvon. Tio donos eblon al la studento daŭrigi la studadon en bulgara ŝtata universitato kaj akiri ankaŭ ŝtatan diplomon.

Bazaj studfakoj kaj specialiĝoj: turismiko, ekonomiko kaj gvidado de turismaj firmaoj, eŭrologio, komerco, ĵurnalistiko, administrado, librotendado/kontado, informadiko.

Kromaj studfakoj kaj fakoj por specialiĝo estas: komputila tekniko, internacia patenta juro, scienc-teknika informado, turisma animado, organizado kaj gvidado de hoteloj kaj restoracioj, ekskursgvidado.

Post la sukcesa fino de la studado, studentoj ricevos AIS-diplomojn por bakalaŭroj kaj magistroj kaj ankaŭ (post libervola, aldona senpaga studado/specialiĝo), surbaze de la ŝtata licenco №201012879 ŝtate agnoskitajn dokumentojn, validajn en EU pri jenaj profesioj: komerca reprezentanto (341040), librotenisto (344030), gvidanto de oficejo (346010), komputila programisto (481020), teknikisto de komputila tekniko (523050), hoteladministranto (8110101),

kuiristo (811070), organizanto de turisma priservado kaj vojaĝagentejoj (812010), turisma ĉiĉerono (812030), animanto de la turisma agado (812040).

Tiuj kiuj bezonas bulgarajn viziojn ricevos invitleterojn por la studvizitoj.

✉ leonov@rozabg.com

✉ 4300 Karlovo p.k.44 Internacia Universitato Karlovo, Bulgario.

Jen la okazo studi kaj specialiĝi en internacia, amika medio, uzante Esperanton kiel stud- kaj kontaktingvon! Ni atendas vin en Karlovo!

Prof. **Bojidar Leonov**, Rektoro de IUK

Elektokampanjo en la Civito

La 15an de aŭgusto la Kapitulo de la Esperanta Civito pri-traktis la elektojn por la Senato. Laŭ la normoj kaj la kutimoj, estas kvar limdatoj:

— 30 sep 2011: lasta tago por liveri al la Kortumo la kandidatlistojn;

— 10 okt 2011: enpaĝigo de la speciala numero de *Heroldo de Esperanto* kun la programoj, la kandidatlistoj, la biografioj kaj fotoj de la kandidatoj, la balotilo ktp;

— 30 nov 2011: oficiala censado; kiu petos la civitanecon poste, tiu ne rajtos baloti en decembro;

— 15 dec 2011: elektoj por la Senato.

La elektoj disvolviĝos ĉie la 15an de decembro, en diversaj balotejoj, kiuj estos pli nombraj ol en 2006, pro la plimultiĝo de la civitanaro.

HeKo

Savi la vivon! (3)

Christian Declerck (Belgio)	50,00
Ivo Durwael (Belgio)	25,00
Hilmar Ilton Santana Ferreira (Brazilo)	47,62
Brita Kristana E-Organizo (Britio)	110,00
Miland Joshi (Britio)	11,49
L. J. Lane (Britio)	22,73
Esperanto-Asocio de Skotlando (Skotlando/Britio)	100,00
Glasgova Esperanto-Klubo (Skotlando/Britio)	60,00
Raita Pyhälä (Finlando)	500,00
I. Ensuque (Francio)	100,00
Anne Jausions (Francio)	24,00
H. le Bihan (Francio)	100,00
D. Lacambre (Francio)	200,00
A. Leonard (Francio)	50,00
Laurent Vignaud (Francio)	13,00
Horst Vogt (Germanio)	110,00
Ina Tautorat (Germanio)	100,00
Abel Montagut (Katalunio/Hispanio)	50,48
Francisko Lorrian (Kanado)	47,62
Spomenka Štimec (Kroatio)	20,00
Bert de Wit (Nederlando)	50,00
Rob Moerbeek (Nederlando)	100,00
Nikola Rašić (Nederlando)	100,00
Els van Dijk (Nederlando)	50,00
Ton Witkam (Nederlando)	100,00
Jarl Hammarberg (Svedio)	22,17
Roland Larsson (Svedio)	100,00
Bruno Graf (Svislando)	81,97
Christoph Scheidegger (Svislando)	81,97
Anonima (Nekonata lando)	500,00
Esperantistoj el Katowice	
per Adam Wilkus (Pollando) 300 zł	75,00
Lidia Ligeża (Pollando) 500 zł	126,26
Marian Łaba (Pollando) 100 zł	25,31
Hanna Skalska (Pollando) 1000 zł	251,25
Jevgenij Tiĥonov (Ruslando) 1000 rub	23,81
Entute ekde 16 jun ĝis 18 aŭg 2011	3.406,68 eŭroj
Je la 15a de junio 2011	21.786,50 eŭroj
Je la 18a de aŭgusto 2011	25.193,18 eŭroj

Koran dankon pro la donacoj kaj pro la kortuŝaj sandeziroj! Donacoj estas plu akceptataj ĉe la UEA-konto "gore-z". Oni povas pagi ankaŭ al kelkaj bankaj kontoj (eŭra, rubla, zlota), per [PayPal](#), kaj per Jandeks-denĝi. *Aleksander Korĵenkov*

KCE: Ministroj lernas Esperanton

Sekve de la interkonsento subskribita komence de junio 2011 inter la Esperanta Civito kaj la Kabinda Respubliko, pluraj ministroj de la Kabinda registaro, inkluzive de la Kanceliero, en aŭgusto lernis Esperanton ĉe Kultura Centro Esperantista, kadre de dusemajna intensiva seminario por la preparo de la kadroj de la nova subjekto de internacia juro.

La seminario, kies ĉefaj temoj estas leĝofarado, organizado kaj geopolitiko, okupiĝas ankaŭ pri nia lingvo kaj pri la lingvo Fjote. Unu el la karakterizoj de la nova kurso en la Kabinda revolucio estas la forlaso de la portugala favore al la franca kiel diplomacia lingvo, kaj la ĝenerala fĵotigo de la institucia kaj politika vivo. Iom post iom oni elektas jurajn kaj politikajn terminojn en la afrika lingvo, por difini oficojn, partiojn, normojn. Por la unua fojo Esperantio gastigas realigon de afrika lingvo.

HeKo



Esperanto en oficiala retejo

Lige kun la 124-a datreveno de la *Unua Libro*, la 26an de julio 2011 en la retejo de la Pollanda prezidanteco en la Konsilio de la Eŭropa Unio aperis mallonga artikolo pri la historio kaj avantaĝoj de Esperanto. La artikolo estas legebla en la pola kaj la angla versioj de la retpaĝo. Krome, sub ambaŭ versioj aperis Esperanto-traduko. La tekston preparis Pola Esperanto-Asocio, kunlabore kaj interkonsente kun la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de Pollando

Paweł Fischer-Kotowski

Nova konkurso: "Pri kio revas arboj"

Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2011 Internacia Jaro de Arbaro. La revuo *Juna Amiko* kadre de ĉi tiu jaro organizas konkurson: *Pri kio revas arboj*. Ni deziras, ke vi montru, kion donas al ni arbaro, kaj kion ni povas doni al arbaroj, por ke ili akompanu nin kiel eble plej longe. Ĉiu el ni vidas la mondon alie, do ĉies prezento estos alia, tial vi elektu liberan teknikon por via verko. Vi povas sendi foton, verki rakonton, poemon aŭ kanton, desegni aŭ pentri, aŭ uzi alian teknikon.

Valoraj premioj atendas vin. Sendu viajn laboraĵojn kun indiko: *Konkurso — arbaro* ĝis la fino de la jaro 2011 al Silezia Esperanto-Asocio, str. Stanisława Dubois 3/1, PL 50-208 Wrocław, Pollando. Ne forgesu aldoni vian nomon kaj adreson.

La konkursaĵoj estos prezentitaj en la bela lokalo de la Silezia Esperanto-Asocio en Vroclavo kaj pruntedonotaj al Urbaj Bibliotekoj en kelkaj Pollandaj urboj.

Małgosia Komarnicka

La 18an de junio 2011 en Hago subite forpasis

Jacques (Jacobus Antonius) Tuinder (1933–2011)

esperantisto ekde 1951, aktiva ekumenisto, prezidanto de la romkatolika IKUE (1966–1971) kaj de la evangelia KELI (2000–2004). Profesie sociala helpisto, li bonfaradis ankaŭ per Esperanto: ekde 1966 en la Agado E3 kaj ekde 1996 en la fondaĵo *Evidente* li helpis milojn da vindhandikapitoj en Afriko, Azio, Orienta Eŭropo kaj eksa Sovetunio. Laŭreato de la premio Deguchi (1990), kavaliro de la la reĝa ordeno Oranje Nassau (1998).

La 20an de junio 2011 en Moskvo forpasis

Magomet Izmajloviĉ Isajev (1928–2011)

doktoro de filologio, profesoro, fakulo pri iranaj lingvoj, sociolingvistiko kaj interlingvistiko. Esperantisto ekde 1956, li verkis sciencajn studojn *Jazyk Esperanto* (1981), kunaŭtoris lernolibron de Esperanto (1984) kaj estis la sola prezidanto de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (1979–1989).

Ni funebras kaj kondolencas.

Antaŭ dudek jaroj

Albert Adylov rememoras

Probable, la leganto tuj konstatos, ke la titolo de ĉi verko estas pruntita ĉe Jaroslav Hašek. Kvankam la grado de la persona partopreno de la ĉeĥa satiristo en la Pragaj tumultoj de 1897 draste malsamas kun tiu de la engaĝiteco de la aŭtoro de ĉi tiuj linioj en la Ruslandaj eventoj de aŭgusto 1991, ilin kunigas unu komuna trajto: rememoro pri ĉio vidita kaj travivita. “Feliĉas, kiu al ĉi mond’ en ties plaga horo venis”, — diris la rusa poeto Fjodor Tjutĉev.

Tamen, tute sincere, en la realo tiu “horo” (pli ĝuste, tri-kvar tagoj) apenaŭ faris “plagan” impreson. Se esti preciza, la aŭtoro estis inter la lastaj enlandanoj, kiuj eksciis pri la okazaĵoj — la 19an de aŭgusto 1991, inter la 11a kaj la 12a horoj laŭ la loka Kaliningrada tempo. Tiam li estis laboristo en la provianta butikoj de sia patrino, kaj tiu cirkonstanco emigis lin al neglektado de la labor-disciplino. La antaŭan nokton la aŭtoro pasigis en studenta komunloĝejo, post abunda drinkado, kaj al la civilizo li revenis, kiel dirite, nur tagmeze. Lin renkontis kolera krio de la estrino:

“Kie vi vagaĉas. Ja en la lando estas ŝtatrenverso!..”

“Gloron al Vi, Sinjoro”, — estis la unua reago de la aŭtoro, kaj la dua estis malfermo de unu el la boteloj da moldava “Pinot”, kestoj kun kiuj plenŝtopis la butikojn deponojn. Du glasoj da blanka vino kun tre stranga indiko pri la alkoholeco (sur la etiketo estis: 6–14%) pacigis lin kun la realo kaj akcelis lian fatalismon agorde kun la vortoj de Puŝkin: “Sama destin’, nur estu vin’ ... jen havu ĝin!”

Sed diri, ke la aŭtoro estis tute indiferenta, estus peki kontraŭ la vero. Necesas konfesi, ke li subtenis la puĉon. Kompreneble, ne per agoj: dum la tri antaŭaj jaroj (1988–1990) li estis aktiva antikomunista, kaj eĉ transirinte, unu jaron antaŭ la aŭgusta puĉo, el la “demokratia” opozicio al la opozicio “patriota”, li ne povis perforte rompi sin. La tiamaj gvidantoj de Sovetunio por li tute ne estis “siaj”, kaj la aŭtoro povis subteni nur la ideon mem (“Ho, mitralojn ĉi tien, mitralojn!”), — diris Vasilij Ŝuljgin en 1917), sed ne ĝian konkretan realiĝon,

La “puĉistoj”: Ministro pri eksteraj aferoj Boris Pugo, vicprezidanto de USSR Gennadij Janajev, vicprezidanto de la Konsilio pri defendo de USSR Oleg Baklanov en gazetara konferenco la 19an de aŭgusto 1991.



kaj tute ne la “realigantojn”. Vespere, finfine enŝaltinte televidilon, li kun la tuta lando adekvate aprecis la tremantajn manojn de la “plenumanto de la prezidentaj devoj” Gennadij Janajev. Ankaŭ la programo, prezentita de la puĉistoj (precipe ĝia lasta artikolo pri solvo de la provianta problemoj per faciligo de la proceduro de disponigo de apudurbaj parceloj al la civitanoj), tute ne donis bazon por taksu la intencojn de la puĉistoj seriozaj.

Do, firme kredante, ke okazas io “verŝajne ĝusta” la rememoranto tre skeptike akceptis la okazaĵojn kaj elektis la pozicion de flanko observanto. Ankaŭ la grandega plumulto de liaj samlandanoj pasigis ĉi tiujn aŭgustajn tagojn same kiel antaŭ aŭ post unu jaro — zorgante pri sia ĉiutaga pano. La “ŝtatrenverso” en la ĉefurbo, zorgigis la provinccanojn ne pli profunde ol eventoj en Bankoko aŭ Bonaero.

Probable, ĝuste pro tio la rememoranto estas informita pri tiuj eventoj ne pli ol la ceteraj — en la limo de ĉapitro en lernolibro de historio. Poste oni eksciis, ke la 18an de aŭgusto la puĉontoj konigis sian planon al Miĥail Gorbaĉov. Tiu ne subtenis ilin, sed ial li ankaŭ ne kontraŭstaris — evidente, por ĉiu okazo. Kaj la sekvan tagon, je la ortodoksa festo de la Transformiĝo, al Moskvo venis soldatoj kaj tankoj. Dum konsiderinda tempo ili ricevis nenium ordonon agi, kaj, kiam la ordono estis ricevita, ili ne plenumis la ordonon.

Ĝenerale, se temas pri la armeo, ĝi estis je la flanko de la puĉistoj, krom kelkaj tre sagacaj kaj bone informitaj generaloj, kiuj esperis persone profiti transiron al la demokratia alo. Sed la plejparto de la superaj armeaj ĉefoj formale subtenis la ribelon (pro tio ili poste estis eksigitaj aŭ eksigintaj), sed nur *formale* — ja surloke estis nenio, kion ili devus subteni per sia forto, ĉar ekster la centro de Moskvo en la lando okazis nenio.

Eksa samklasano de la aŭtoro de ĉi tiuj linioj, tiutempe servis en mararmea infanteria brigado en Baltijsk (germane: Pillau). Laŭ lia rakonto, je la tago de la puĉo oni alvokis ĉiujn al la brigada placeto, kie la generalo tre entuziasme (“jen finfine!”) anoncis al ili pri la enkonduko de la eksterordinara stato en la lando kaj esprimis la certecon, ke la subuloj plenumos ĉiun ordonon de la Ŝtata Komitato pri Eksterordinara Stato (ruse: GKĈP). Post tri tagoj la armeanoj denove estis vokitaj al la placeto, kaj la sama generalo, jam per sia ordinara voĉo, rapide elbuŝigis: “La prezidento denove ekplenumis siajn devojn, la laŭleĝeco estas restarigita, la kontraŭkonstitucia puĉo fiaskis”. Ĉi tiel estis travivita la ŝtatrenverso en ĉi tiu armedivido.

Je kelkaj dekoj da kilometroj de Baltijsk, en Kaliningrado, malmultenombraj reprezentantoj de la demokratia opozicio klopodis fari ion realan por aranĝi reziston al la puĉo. Kelkaj el ili per la aŭtomobilo *Zaporofec* veturis por “ribeligi” iun armean taĉmenton. Tie oni iom draŝetis la venintojn, forŝiris pordon de la aŭtomobilo, kaj veturigis ilin al milico (tiel en Sovetunio estis nomata polico), de kie ili estis tuj liberigitaj. Dum la tutaj tri tagoj la milicanoj montris mirindan lojalecon al la Kaliningradaj subtenantoj de Jelcin: la negrandan konstantan manifestacion sur la Venkoplaco — la ĉefplaco de la

urbo — neniŭ ĝenis, kaj fine montriĝis, ke la manifestaciantoj estas venkintoj.

Sed en Moskvo estis pli varme. La verkisto kaj historiisto Valerij Ŝambarov jene rememoris la eventojn ĉe la Domo de Sovetoj de RSFSR, konata kiel la Blanka Domo:

«La 20a de aŭgusto, 20:00, La Blanka Domo. Proksime al ĝi, ĉe la metrostacio Barrikadnaja, en la avenuo Kalinin, oni per laŭparoliloj kaj simple per raŭkiĝintaj voĉoj vokas virojn al helpo, “por defendi la lastan terpecon de la libera Moskvo”. Amasiĝas 10–15-personaj grupoj da manifestaciantoj. Maljuna virino histerie krias: “Sufiĉas manifestacii! Necesas iri tien!” Oni torente iras al la Blanka Domo de ĉie, de ĉiuj proksimaj metrostacioj, laŭ ĉiuj stratoj. Super la Domo de Sovetoj ŝvebas aerostato kun pendantaj grandegaj standardoj: la trikolora Ruslanda, la flava-blua Ukrainia, sub ĝi ankoraŭ du. Mi ne scias, kiuj. Armenia? Litovia? Sed tute ne gravas. La aerostato mem servas kiel standardo, kiel la celo, al kiu oni iras. Viro provas haltigi la homojn. Li nomas sin KGBano. Oni devas konfesi, ke en tiuj cirkonstancoj li estas vera kuraĝulo, se li ne estas frenezulo. Same, tute raŭke li kriadas: “Ne iru tien!”. Ankaŭ lin ĉirkaŭas homamaso. Apud la Blanka Domo oni konstruas barikadon el strataj necesejoj. Fetorego. La necesejoj ŝanceliĝas kaj falemas flanken. La trikolora Ruslanda standardo estas sur la fusilo de la laboristo en la monumento pri la ribelo en la jaro 1905a. La trikoloro estas ĉie. Sur barikadoj, sur tankoj, inter la homoj. La tuto aspektas kiel fortikaĵo kun linioj de barikadoj ĉirkaŭe, tankaj kanonoj, giganta Blanka Domo en la centro, dekmiloj da homoj ĉirkaŭ ĝi, kaj amasego da standardoj. Tio impresas de ekstere. Sed interne estas malordego. Nur unu el la barikadoj estas sufiĉe firma. La ceteraj tute ne kapablas rezisti al tankoj. La minacaj centmilimetr-kalibras kanonoj ne enhavas pafaĵojn. Kurioze, la atakantoj scias tion, sed la defendantoj — ne scias. Sloganoj. Multaj pri puĉuloj kaj pri faŝismo: “For la okopon da bojaroj!”, “Jazov — merdo!”, “Janajev — feĉulo!” <...> “Al la lasta batalo kontraŭ la ruĝventruoj!”, “Sen maltrafo pafu bolŝevistojn!”, “8, 7, 6, 5, 4, 3, 2, 1, 0!”, “Puĉistoj, kapitulacu! Vi havos neniun punon! Nek vilaojn, nek pensiojn, nek privilegiojn!” <...> Totala malordo. Amasoj da homoj alfluas kaj forfluas. Du junulinoj kaj du junuloj interparolas: kien ili fuĝu, se komenciĝos batalo. Ili decidis direkti sin pli proksime al ambasadoj».

La Kaliningradaj demokratoj la 21an de aŭgusto sekvis la okazaĵojn en Moskvo, aŭskultante la programojn de “Radio Libero” sur la ĉefplaco. La postamento de la monumento Lenin transformiĝis al tribuno por spontanaj paroladoj. Maljuna opoziciulo, ne sukcesinte regi siajn emociojn, mortis sur la tribuno mem — lia koro paneis. Kiam la radio informis, ke la puĉistoj kapitulacis, Kaliningrado reagis: kvar el la manifestaciantoj, ankaŭ Alen Kris bone konata al la legantoj de *La Ondo*, supreniris sur la tegmenton de la urbodomo, en kiu situis la urba komitato de KPSU kaj la urba plenumkomitato, kaj levis la Ruslandan trikoloran standardon — inter la unuaj en la lando. Oni povas diri, ke estis turnita paĝo en la historio.

Nur poste evidentiĝis, kio efektive okazis sub la vualo de ĉi tiu tragikomedio foireca spektaklo, sed tiam la eŭforio regis en la animoj kaj en la koroj. Temas pri la animoj kaj koroj de tiuj malmultaj, kiuj propravole estis engaĝitaj en la ritan dancadon sur la placo. Sed, ripete, la plejparto de la loĝantaro rilatis al ĉi tiuj eventoj kiel al spektaklo, ne pli. La rusoj denove konfirmis sian reputacion de tro ŝtateca popolo. Ŝtateca ne en la senco de la lojaleco al la ordo, sed en la senco de



nekapablo al memorganiziĝo, nekapablo entrepreni ion sen ordono de la estraro. Kaj dum la tagoj de la puĉo, kaj en la sekvaj du jardekoj la dominanta rilato de la “konservativa” parto de la socio al ĉio, okazanta en la lando, estis la sola: “Se oni kondukos nin — ni iros; se ne — do ne...” Kion fari? Bedaŭrinde, ni estas tiaj, kiaj ni estas. Efektive, en aŭgusto 1991 ja estis ordono, sed la estraro, malgraŭ la altaj rangoj kaj oficoj, evidentiĝis tro senaŭtoritata kaj necerta pri si mem. La rusa popolo ne akceptis tiun ordonon kiel ordonon veran kaj decidis atendi kaj observi. Ĝi observas ĝis nun...

Sed eble tute ne gravis la personecoj de la gvidantoj de la puĉo. Ekzemple, unu el la iniciatoroj de la “renverso”, brava generalo Valentin Varennikov, en 1994 rifuzis akcepti amnestion en la afero GKĈP, kaj la tribunalo absolvis lin, ĉar evidentiĝis, ke li faris nenion kontraŭleĝan. Ĉu digne? Sendube, jes. “Elstaris viroj niatempe...”, — diris Lermontov. Sed la afero, kiun ili tre heziteme defendis, havis jenan econ — ĝi estis historie malgajnota. La grandega regno en tiu stato, en kiu ĝi estis en aŭgusto 1991, estis mortkondamnita. La meĥanismoj de ĝia memlikvido, metitaj ankoraŭ ĉe la formiĝo de Sovetunio, jam delonge funkciis plenpotence. La gvidantaro de GKĈP nur sugestis la ideon, ĝi montris, al kiu direkto oni povintus iri, sed samtempe ĝi montris ankaŭ, ke fari tion neniŭ arde deziras — eĉ ne la gvidantoj mem.

La nuntempa historiisto Andrej Zubov skribis: “Plua uzado de perfortaj metodoj flanke de GKĈP kondukus al komenco de sanga interna milito kun katastrofaj konsekvencoj; kaj la puĉistoj ne kuraĝis”. Tamen ni scias, ke post du jaroj iliaj kontraŭuloj verŝis la sangon tute trankvile, ĉar ili firme sciis, ke ili defendas sian propran potencon kaj siajn proprajn riĉaĵojn. Sed en aŭgusto 1991 estis preskaŭ neniŭ deziranto defendi “la antikvan fabelon”. Tute male, konato de la aŭtoro, kiu tiutempe laboris en unu el la Kaliningradaj distriktaj komsomolaj (t. e., junkomunistaj) komitatoj, rakontis, ke la komsomolaj oficistoj tuj post la publikigo de la ukazo de Jeljcin pri malpermeso de KPSU tre rapide ŝtelis el la komsomola oficejo meblojn kaj aparatojn.

La 19an de aŭgusto de tiu memorinda jaro sur la Venkoplaco de Kaliningrado la aŭtoro renkontis sian konaton — samideanon kaj drink-kunulon. Ili interŝanĝis rigardojn kaj salutis unu la alian en maniero preskaŭ sakrilegia: “Kristo Resurektis!” — “Vere Resurektis!” Sed jam la 21an de aŭgusto, la konato sur la ĉefplaca tribuno diktis salutan telegramon al Jeljcin. La rememoranto tiel ofendiĝis, ke poste li dum tuta monato ne interparolis kun sia konato. Verŝajne, tio estas komprenebla el la ordinara homa vidpunkto, ja tiam la aŭtoro estis apenaŭ 19-jara.

En La Ondo pri La ondoj

Revueto pri la 33a Moskva Internacia Kinofestivalo

Se pasintjare unu el la ĉefaj festiva-laj tendencoj estis “provo lerni de la pasinto” — en pli ol plejparto de la konkursaj filmoj en 2010 temis pri la socialisma epoko, ĉi-jare estis preskaŭ oficiale deklarita, ke la ĉeftemo estas “reveno”. Sendube la menciita fenomeno estas tre multfaceta, kaj oni povas atribui ĝin preskaŭ al ĉiu kinaĵo, sed la festivalo liveris vere “revenajn” pecojn. Pri ĉiuj oni povas verki apartan eseon, ĉar ĉiuj meritas, sed ni provu limigi nin per mallongaj revuetoj.

Ni komencu per la hungara-rumana filmo, kiu ja titoliĝas *La reveno* (Visszatérés, reĝ. Judit Elek). Katrina, mezaĝa juda virino, kune kun la familio aŭte veturas al sia patrujo — kie ŝi antaŭ multaj jaroj estis mirakle savita, ĉar ĉiuj ŝiaj parencoj estis portitaj al Auschwitz. La edzo de Katrina esperas, ke tiu vojaĝo iom trankviligas ŝian animon. *La reveno* ne estas aparte elstara filmo, ne laste pro la jam tre uzita temo de militaj koncentrejoj, sed ĝi estas tre sincera kaj multemocia.

La itala filmo *La facila vivo* (La vita facile, reĝ. Lucio Pellegrini) rakontas pri iom alispeca reveno — pri kuracisto Mario, kiu ne estis tre honesta en financaj aferoj kaj pro tio fuĝis el Romo en Afrikon, kie li laboras ĉe volontula misio. Sed Mario ne volas reveni kaj restas en Afriko, kvankam li konstante konversacias kun siaj amikoj: ĉu reveni aŭ ne? La filmo estas tute profesie farita, kun sufiĉe da ridindaj epizodoj, sed ĝin fuŝas troa “holivudismo”: fojfoje estas tro da bildoj kaj maltro da sentoj.

La bildkarto de la 99-jara japana klasikulo Kaneto Shindō estas historio de simpla kamparano, kiu venas al vidvino de sia pereinta arma amiko por simbole transdoni al ŝi bildkarton, kiun ŝi sendis al la edzo. La mortinta soldato tiel volis sciigi al la edzino, ke li sukcesis legi ŝian lastan leteron, sed ankaŭ la postvivinto revenas hejmen kaj trovas ĝin tute vaka... La filmo estas vera majstroverko — la aĝo neniel influis la talenton de Shindō, kiu, interalie, prenis la ĉefpremion de la Moskva festivalo rekordajn tri fojojn (1961, 1971, 1999).

Tute alispeca estas la filmo de la juna sudkorea reĝisoro Wong Ching Po

La venĝo. Historio de amo (Fuk sai che chi sei), kvankam ankaŭ ĝi rakontas pri siaspeca reveno, klare respeguliĝanta en la titolo — la protagonisto revenas, por venĝi pri/pro sia amo. Ĉi tiu verko estis anoncita kiel “enhavanta amason da sangaj kruelaj scenoj”, sed reale evidentiĝis, ke kvankam jes la filmo abundas je sango ktp., ĉio estas absolute nemalhav-ebla. *La venĝo* laŭmerite ricevis la premion por la plej bona reĝisorado.

Sufiĉe elstara kaj priparolata fariĝis *La foriro* (Odcházení) — reĝisoro debutto de ... Václav Havel, la mondfama dramaturgo kaj eksprezidanto de Ĉeĥio. Havel prezentis historion pri kanceliero Riger, kiu devas demisii kaj ene de du tagoj forlasi la delonge loĝatan bienon. La filmo estas emfaze teatra — ĉar Havel kreis teatran dramon, tamen ne surscenigis, sed filmis ĝin.

Ne “reven-tema”, sed nepre menciinda, ĉar tuj ŝatita de la publiko, estis la serba filmo *Montevideo, la Dia vizio* (Montevideo, Bog te video). En 1930 en nacian futbalan federacion de Jugoslavio venis invito partopreni la unuan mondpokalon, okazontan en Montevideo, kaj do la piedpilkistoj kaj ĉirkaŭuloj dediĉas ĉiujn fortojn por proksimigi la revon. La filmo brave konfirmas la faman eldiron, laŭ kiu “futbalo ne estas la vivo. Futbalo estas multe pli”, kaj krome ĝi estas


specimeno de plena optimismo. Oni ne scias, kiel la kreintoj sukcesis tion, sed estas fakto: ekde la unua ĝis la lasta minutoj *Montevideo* plenigas spektantojn per vitalaj emocioj kaj ĝojo. Ne hazarde ĝuste *Montevideo* ricevis la premion de spektantoj...

Des pli paradoksa fariĝis la decido de la ĵurio, ĉi-foje prezidita de Geraldine Chaplin, kiu atribuis la ĉefpremion al la bona, sed tute mallauĉa kaj silentema hispana filmo *La ondoj* (Las olas) de Alberto Morais. Spektante ĝin, oni ekscias, kiel post 60 jaroj maljunulo Miguel revenas (ja revenas!) el Madrido en malgrandan landliman urbeton, kie li restis kiel rifuĝinto en sia adolesko. Miguel rememoras tiun tempon kaj provas trovi respondojn al demandoj, turmentintaj lin dumvive. Laŭsupoze *La ondoj* fariĝis kompromisa decido, ĉar la ĵurio ne povis interkonsenti pri aliaj eventuale laŭreataj filmoj.

Ekster la konkursa programo tradicie popularegis la programo 8,5, kiu ĉiam prezentas po naŭ filmoj senescepte elstaraj. Ĉi-foje temis pri *Pina* — 3D-formata dancofilmo pri la ĵus forpasinta Pina Bausch, *Carlos* — pri la teroristo Ilich Ramírez Sánchez, *Nigra Venuso* — ŝoka historio de la sudafrikanino Sarah Baartman, *La muelejo kaj la kruco* — filmo inspirita de la fama Bruegel-pentraĵo *La vojo al Kalvario*, kaj kelkaj aliaj.

Ĝuste en 8,5 estis montrita la jam konata *Melankolio* — ĉi-momente la plej freŝa laboraĵo de Lars von Trier, kiu rakontas pri perejo de la mondo, kiun kaŭzas la planedo Melankolio, proksimiĝanta al la Tero. Oni memoras la skandalon ĉirkaŭ eldiroj de von Trier dum la maja kinofestivalo en Kanno. Ni ne juĝu la reĝisoron, kiu evidente tro ŝatas nervigi publikon kaj ĉi-foje misvojiĝis en propraj vortoj. Gravus, ke *Melankolio* estas ege bona kaj, kio gravegas, bilde bela filmo. Admirinda estas Kirsten Dunst, plenuminta la ĉefan rolon de Justina. Dunst, ĝis nun ĉefe memorata kiel “amikino de Spiderman”, finfine transiris limojn de unu rolo kaj prezentis vere interesegan karakteron de homo, kiu indiferentas absolute pri ĉio.

Grigorij Arosev



HEA

La revuo kaj eldonejo *Literatura Mondo* starigis altajn normojn por ajna sekvonto, kaj dum la same Budapeŝta, sed movade vast-temara revuo *Hungara Vivo* (1961–90) de Hungara Esperanto-Asocio nur grade kaj parte sekvis sian prestiĝan antaŭulon en la beletra kampo, la eldona agado de HEA, duonan jarcenton post LM, sukcesis kvante superi tiun kaj, eble, kvalite egali ĝin.

Ĉi tiuj atingoj dankeblas plejparte al unu homo, Vilmos Benczik (1945-), kiu inter 1977 kaj 1990 gvidis la eldonan agadon de HEA. En tiu periodo sub la sceptron de Benczik aperis Esperantaj libroj — ofte en miloj da ekzempleroj — almenaŭ ĉiun duan monaton, kun eĉ po deko da titoloj en la pintaj jaroj 1982, 1984 kaj la jubilea 1987.

Multajn librobretojn ornamas plu la kromkovrile prun-blua *Tutmonda sonoro* (1981), poezia monumento de kaj al Kalocsay, la helverda *Hungara antologio* (1983), aŭ la oranĝo de la duvoluma, milpaĝa *Trezoro* (1989). La dua prezentis, precize 50 jarojn post samtitole antaŭula verko, panoramon de la hungara beletra, dum la tria elmontris, kun impona ambicio, la vastan gamon de la Esperanta novelarto. (Anekdotoj, de *Trezoro* mi mem posedas vere trezoran ekzempleron. Ĉar mispreso lasis en ĝi plurajn paĝojn blankaj, mi petis kelkajn el la aŭtoroj enverki ion por mi. Tiel mi povas posedi — ekzemple — bindite unuekzempleran, manskriban prozaĵon de Camacho.)

Multaj libroamantoj trovis plezuron ĉe HEA per la distraj *Eŭlalia* kaj *Mariagnes* de Lorjak aŭ la pli profundaj *Adolesko* de Vaha kaj *Lappar, la antikristo* de Tóth, emociojn per teatraĵoj de Julian Modest aŭ *Vojaĝo al disiĝo* de Ŝtimec, streĉon per *Adiaŭ, Kuzko!* de Kníchal aŭ *Tiu toskana septembro* de Tavanti/Ertl. Eblis riĉigi konojn pri niaj klasikaĵoj per HEA-reldonoj de Baghy, Kalocsay, Szathmári, Szilágyi. Ne mankis tradukoj el la hungara beletra, el Ady, Heltai kaj Karinthy (mem esperantisto), Móricz, Petőfi, Attila József... Pedagogiajn celojn efike servis grandkvante eldonitaj lerniloj, de *La verda koro* de Baghy kaj la ilustritaj kajeroj *Esperanto por ni* de Mikuláš ĝis la utilegaj *Gvidlibro por supera ekzameno* kaj *Baza literatura krestomatio*, kaj eĉ *Esperanta-kamboĝa vortaro*.

Pri ĉio ĉi Esperantujo relative bone konscias, sed malpli konate estas ke,



La stelulo de HEA, István Nemere

ĉefe en la 1980-aj jaroj, la HEA-eldonejo funkciis ankaŭ hungarlingve, ofte rilate librojn malmulte aŭ neniom rilatajn al Esperanto. Verŝajne mondrekorda estas la sistema aperigado de Esperanto-beletraĵoj en hungara traduko: sinsekvaj hungarigoj de la porinfana *Kumeŭaŭa* de Sekelj, la krimromanoj *Varmas en Romo* de Tavanti (1988), *Ŝia lasta poŝtkarto* de Elgo, *Kazinski venas tro malfrue* de Dorval (1990), sed ankaŭ *Maŝinmondo* de Szathmári (1989). En la jaro de politika liberaliĝo, 1989, ĝeneralan publikon celis dokumentaĵo pri la ŝakista familio Polgár, aŭ libro pri la manipulita proceso (1949) kontraŭ László Rajk.

Simptome por tiuj hektikaj tempoj, tra-Esperanta hungarigo de *La finna vojo* de Kekkonen estis aperonta, aŭtune de 1989, kvazaŭ substreke al la esperoj de Hungario fariĝi neŭtrala kiel Finnlando — sed dum la kelkaj semajnoj da traduko kaj presado la politika evoluo superis eĉ tiun stadion, kaj fine la libro dronis en senatento, prefacite de la intertempe signif-perdinta politikisto Imre Pozsgay.

Alia kuriozaĵo estas la tute mala sorto de la dulingva, ilustrita seks-lernilo *Kulturo de la amo / Bildlibro pri la sekso vivo* de Vilmos Szilágyi, atinginta rekordan eldonkvanton de 246 mil ekzempleroj, kun represo je 40 mil. Ĝi fariĝis certe la plej amasa libro Esperanta de ĉiuj tempoj, kaj eble ankaŭ tiu tutsocie plej profundefika (kun eventuala escepto de la Unua Libro). Plejpartege ja aĉetis ĝin klerigemaj neesperantistoj. (Tiutempe HEA povis eĉ permesi al si televidan reklamadon de siaj eldonaĵoj — mi ne memoras ĉu ankaŭ pri la verko de Szilágyi...)

Sed la sendiskuta stelulo de HEA

estis, en ambaŭ lingvoj, István Nemere. Tra la 1980aj jaroj, de post la rakontaro *La naŭa kanalo* (1981), en rapida ritmo aperis en Esperanto liaj romanoj *La fermita urbo*, *Sur kampo granita*, *La blinda birdo*, *Febro*, *La monto*, *La alta akvo*, *Terra*, *Serĉu mian sonĝon*, *Dum vi estis kun ni*, *Vivi estas danĝere*, *Vi povas morti nur dufoje...* Kaj ofte HEA eldonis ankaŭ hungaran version de la samaj titoloj, plezurigante la kreskantan Nemere-fanaron kaj — sian monujon. En intervjuo Nemere asertis ke en Esperanto li klopodas aperigi siajn plej bonajn verkojn. Bonŝance, ĉe HEA li trovis tre bonajn zorgantojn pri liaj verkoj, kaj pri liaj tajperaroj. (Interna klaĉo ĉe HEA rakontis pri Nemerea ŝafo, kiun oni devis korekti al *ŝranko*, kaj iu *vagonaro* kiu manuskripte ankorau mis-enhavis la literon i...)

La eldonaĵoj de HEA ĝuis vastan debiton, same tra la tutmonda merkato Esperanta kiel en multaj librovendejoj, eĉ kioskoj, de Hungario. Kial ĉi tiu eksterordinara sukceso? Pro escepta historia konstelacio: la pli kaj pli kapitalisma socialismo de la tiama Hungario. Unuflanke: apud la malmultaj, peze funkciantaj ŝtataj eldonejoj nur kelkaj sociaj organizaĵoj rajtis eldone agadi, inter kiuj HEA; aliflanke, al entreprenema “vulpeto” jam eblis trovi kaj profitige ŝtopi la merkatajn breĉojn neglektitajn de la ŝtataj eldon-mamutoj.

Samtempe, se rigardi translimen, al HEA prosperis komerci same okcidenten kiel orienten. Specife, la eblo fari interŝanĝ-komercon kun Sovetio certigis altajn eldonkvantojn, pro la vasteco de la verda merkato tiulanda. Alispeca komerco floris kun okcidento: mi mem (kaj certe ne mi la sola) aĉetis dekojn da, ĉefe, Nemere-verkoj je hungaraj prezoj, por pluvendi ilin kontraŭ valuto okcidenta.

La fino de tiu ĉi florado venis draste, praktike samtempe kun la forvelko de la revuo *Hungara Vivo*. Ĝuste ĉi ties lasta numero (1990, №5-6) konsistis trione el reklam-katalogo de 78 eldonaĵoj, preskaŭ ĉiuj de HEA mem. (La reta katalogo de UEA registras 93 HEA-eldonaĵojn, el kiuj okdeko datiĝas el la 80-aj jaroj.) Kelkaj titoloj aperuntaj ĉe HEA (precipe reldonoj de Baghy) fine vidis lumon sub la marko *Fenikso*, presitaj onidire en Aŭstrio. Post 1990, da manuskriptoj restis en la tirkestoj de la Eldona Fako de HEA centoj, se ne pli. Kelketaj ja aperis — sed estus interese scii kie ripozas la aliaj, kaj kiom ili valoras...

István Ertl

Trafe al celo

Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 1: Paroliga metodo kun ekzercaro*. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2008. — 152 p., il.; disko.


Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 1: Paroliga metodo kun ekzercaro. Gvidlibro por instruistoj*. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2008. — 166 p., il.; disko.

Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 2: Paroliga metodo kun ekzercaro*. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2010. — 178 p., il.; disko.

Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 2: Paroliga metodo kun ekzercaro. Instruista gvidlibro*. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2010. — 184 p., il.; disko.

La unua lernolibro kaj gvidilo por instruistoj, eldonita en Brazilo en 2008, la unuajn interesatojn atingis dum la Bjalistoka UK. Granda formato kaj la aspekto de la libroj tuj memorigis la kutimajn lernolibrojn kiujn oni uzas en lernejoj por instrui fremdajn lingvojn.

Efektive, la celo de la aŭtoro, sperta brazila lingvoinstruisto Josias Barboza, estis produkti instrukompleton kiu plibonigus la efikecon de la instruado kaj plialtigus la prestiĝon de Esperanto en lingvolernejoj. Nun jam ekzistas du volumoj kun akompanaj sondiskoj kaj du gvidlibroj por instruistoj kun



lumdiskoj kaj elŝutebla helpoteko kiu prezentas bildojn kaj ekzercaron.

La lernolibro por gelernantoj estas samtempe ankaŭ ekzercolibro: oni povas rekte tie respondi demandojn, solvi taskojn, eĉ desegni. *Esperanto por lernejoj klasoj* celas instrui verajn komencantojn, sed la tuta enhavo estas destinita por proksimume 150 horoj da lernado, do ĉe la fino de la dua volumo oni atingas la nivelon B2. Ĉar la ĉefa celo estas tuj paroligi homojn, en la lernolibro abundas dialogoj, desegnaĵoj, bildoj kaj ekzercoj por ripetado polurante la prononcadon.

Ĉe la fino de la lernolibro estas laŭpaĝa vortlisto, kaj lernanto povas tuj noti la tradukon de novaj vortoj al nacia lingvo aŭ priskribi novan vorton en Esperanto. Aperas iom da gramatiko en partetoj nomataj “gramatikaj gutoj”, sed ili nur donas ĉefajn indikojn, kaj la ĝenerala metodo por lerni la internacian lingvon restas paroliga. Iom ĝene aspektas la uzado de punkto por montri la apartajn radikojn ĉe la vortofarado aŭ indiki la prefiksojn, sed aliaflanke tio helpas al lernantoj kompreni, kiam vorto estas kunmetita kaj deĉifri ĝin. Ĝenerale la aŭtoro fidus je inteligenteco de la lernantoj, ĉar ofte la lernantoj aŭ devos diveni la signifon de frazo logike aŭ demandi la instruiston, sed demandi en Esperanto.

Por ekzerci tre bone helpas ankaŭ sondiskoj, ĉar kutime komencantoj dum lecionoj aŭdas nur sian instruiston kaj ebleco sperti diversajn voĉojn estas tre bonvena. Ne ĉiam la voĉoj de la sondisko prononcas perfekte, sed eĉ tio estas bona sperto, ja en Esperantujo ankaŭ ni apudas diversajn, kelkfoje ne tre klarajn

parolmanierojn, kaj gravas ilin kompreni.


Samtempe kun la instruado de la lingvo estas prezentitaj ĉefaj scioj pri Esperanto, kulturo kaj komunikado. La formato de la libro tre bone konvenas por fari kopiojn, se ne ĉiu lernanto komence povas havi la propran ekzempleron. La aŭtoro pripensis ankaŭ tion kaj en la reta paĝaro www.lernejoj.klasoj.net. (parto “Servoj”) li disponigis por senpaga elŝuto printeblan elĉerpon de la komencaj ok paĝoj de ambaŭ porlernantaj libroj.

La instruista gvidlibro donas multajn utilajn ĝeneralajn konsilojn kiel organizi la kurson, kaj detalajn indikojn kiel uzi lernomaterialon dum la leciono. Tio povas esti tre utila kaj kuraĝiga por tiuj, kiuj nur komencas instrui, sed ankaŭ multe helpas al spertuloj. Simboloj kiuj indikas, ĉu ekzercojn atente aŭskulti, ĉu legi, ĉu skribi, ankaŭ estas utilaj kaj ŝparas tempon. La gvidlibro havas marĝenojn kie jam estas utilaj konsiloj de la aŭtoro, kaj ankaŭ la instruisto povas enmeti siajn proprajn notojn. Estas ankaŭ indikita, pri kiu paĝo de la lernolibro temas, do instruisto havas ekzaktan kopion de la lernolibro, nur por oportuno la ekzercoj estas tuj ĉe la materialo de la leciono, ne en la aparta ekzercaro kiel en lernolibro.

La kreinto de la instrukompleto pensis ne nur pri laboro, sed ankaŭ pri distraj paŭzetoj kaj bona etoso en kurso, tial en sondiskoj estas melodioj por kantetoj kiujn lernantoj povas kanti, eĉ se ili ne tuj centprocente komprenas la vortojn.

La granda laboro, farita de Josias Barboza kaj de la teamo kiu helpis lin, atingas la celon: la instrukompleto estas vere valora kaj altnivela. Tre pozitive ĝin taksis spertaj esperantistoj kiel Katalin Kováts, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Kurt Fischer; kaj nun al multaj esperantistoj, kiuj instruas la lingvon, restas aldoni *Esperanto por lernejoj klasoj* al sia trezorejo. Des pli bone kaj celtrafe estus, se eblus aĉeti la librojn kaj per ili ekinstrui la grupon.

GraĴna Opulskiené



Katalin faris miraklon

Kováts, Katalin. *Stelsemantoj en la ora nordo: Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj*. — Den Haag: E-duKati, 2011. — 159 p., il.

En Stokholmo Katalin Kováts lanĉis sian novan verkon *Stelsemantoj en la ora nordo* dum la printempa renkontiĝo de Sveda Esperanto-Federacio; ĝi vere meritis kortuŝan baptifeston en la sveda ĉefurbo en majo 2011. Al la nomo de la libro apartenas epiteto “Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj”.

Jam dum la unua foliumado ekestis forta legemo kaj konatiĝo pri la vivofazoj de la hungardevena rumano Tiberio Morariu (1901–1987), kies ĉefa stabejo dum lia agado kiel Cseh-instruisto situis en Svedujo. Tute nova, fascina mondo malfermiĝas antaŭ niaj okuloj, kiam ni sekvas la tiutempan agadon en la movado. Nova ĉapitro pri Esperanto en Nordio varmigis mian koron kaj donas energion por lukti antaŭen sur mia propra vivovojo.

Estas malfacile trovi trafajn vortojn por Katalin pro la tre sukcesa agado kun la biografio de Tiberio Morariu. Indas tamen raportoj pri agado de Cseh-instruistoj. Jam en 1960 mi konatiĝis kun la metodo en Bruselo sub la gvidado de ĝia fondinto mem.

Flue kaj bele kuras la aŭtorina teksto. La leganto trovas multajn interesajn detalojn, ofte tute nekonatajn por la nuntempulo. Ankaŭ Morariu mem ricevis lokon kun propraj verkaĵoj; ili estas talente kaj belstile kreitaj.

Ĉio en la nova eldonaĵo atestas pri vere aktiva agado dum la 1930aj kaj 1940aj jaroj. El la aktivado de la pasinta generacio ni povas hodiaŭ ĉerpi sekvindajn ekzemplojn ankaŭ por la hodiaŭa agado. Multajn konatajn agemulojn Katalin prezentas. En la sesdekaj jaroj mi apartenis al la kunlaborantaro de Ernfrid Malmgren (1899–1973). La originalajn kaj tradukitajn verkojn de Stellan Engholm mi antaŭ jaroj avide konsumis. Eliza Kehlet — la filino de gesinjoroj Weide el Hamburgo — ricevis ĉarmulinan rolon en la spertoj de Tiberio, kiu iam donis moneron al ŝi. Eliza, tiam apenaŭ dujara, rapide krietis “mono”. Morariu estis ravita pro la esprimkapablo de ŝieto (bela kombinaĵo!). Ankaŭ nia konata Cseh-instruisto kreive uzis la Zamenhofan lingvon. Estas ĉiam tre agrable trovi tiajn lingvajn juvelojn en la teksto.



Dum la 1930aj kaj 1940aj jaroj Esperanto bele floris. Hodiaŭ ni havas velksezonon, kaj la movado iel stagnas, kvankam en la reto ni vidas multajn pozitivajn fenomenojn.

Tre kolore kaj trafte Katalin prezentas la agadon de niaj antaŭuloj. Morariu atingis bonajn rezultojn, niel li ŝparis siajn fortojn. Lia familia vivo certe suferis pro la konstanta vojaĝado pro lia instrua agado.

Mirinde rapide Katalin sukcesis kolekti bazan fontmaterialon por la verko kaj ĉion talente, belstile redaktis kaj libroforme distribuis al la esperantistoj en Nordio kaj kompreneble al ĉiuj movadanoj en la tuta mondo.

Modeste mi kapablas prezenti ĉi tiun majstroverkon de la konata hungarino Katalin. Estas necese mem tralegi la libron kaj ĝui pri grandiozaj atingiĝoj de la Cseh-instruistoj. Efike kunlaboris Henrik Seppik, Lorenz Friis, Elinjo Pähn kaj multaj aliaj. Temas pri biografio, en kiu la teksto trovas kaj galopas flue.

Al mi la verko estas enciklopedio pedagogia. Kiam propraj fortoj malpliĝas, mi havas jen bonegan vitaminpilolon. Indas resti kiel eble plej ofte ĉe la teksto kaj ĝin ripeti denove kaj denove. Katalin faris miraklon kreitan kun amo, kaj ŝi lasis monumenton por nuntempuloj pri pasintaj tagoj oraj. Ne eblas preteriri, necesas tuj havigi la verkon por aktiva konsumado.

Jorma Ahomäki



Festo por Esperanta poeto

La kroata kaj Esperanta poeto kaj tradukisto Josip Velebit fariĝus centjara en 2011. Liaj kolegoj el mezlernejo en la kroata urbo Vrbovec, kie li iam instruis, omaĝis tion per Ronda Tablo pri Josip Velebit okazinta la 14an de junio. Memortabulo (kun indiko ke li estis esperantisto) estis starigita sur la fasadon de la lernejo. Oni analizis lian rolon en la kroata literaturo. Li tradukis el germana, hungara, bulgara, make-dona...

Spomenka Štimec kontribuis al la diskutoj per prelego pri Josip Velebit, antologia Esperanta poeto kaj tradukisto. Josip Velebit multe tradukis el la kroata al Esperanto. Li estis ankaŭ originala Esperanta poeto, kiun William Auld envicigis en la *Esperantan Antologion*.

Velebit amikis kun la estona poetino Hilda Dresen kaj kroatigis ŝian poezion por la kroata *Antologio de la monda ampoezio*, por kiu li en 1965 peris ankaŭ la versojn de Marie Under kaj Ludmila Jevsejeva, bulgarajn kaj vjetnamajn poemojn. Per la helpo de Hilda Dresen li tradukis al la kroata plurajn estonajn prozistojn.

Spomenka Štimec



Liro kaj IFK ne okazos ĉi-jare

Dum la lastaj jaroj konsiderindan popularecon en Esperantujo ĝuis du tradiciaj konkursoj, ĉiujare organizataj de *La Ondo de Esperanto*: literatura konkurso *Liro* kaj Internacia Fotokonkurso.

Bedaŭrinde, en la 2011a jaro ĉi tiuj konkursoj ne okazos pro la malfavoraj cirkonstancoj de Halina Gorecka, kiu dum pluraj jaroj plenumas la sekretariajn devojn en ambaŭ konkursoj. La redakcio de *La Ondo de Esperanto* petas pardonon kaj komprenemon de tiuj, kiuj planis partopreni, kaj precipe de tiuj, kiuj sendis siajn kontribuojn, sen atendi oficialan anoncon pri (ne)okazigo de la konkursoj.

La redakcio de *La Ondo*

La dua eldono de “Homarano” aperis


Korĵenkov, Aleksander. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. — 2a eldono, korektita kaj ampleksigita. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2011. — 360 p.; 500 ekz. — (Serio *Scio*; Vol. 8).

La 30an de julio 2009 en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Lazarj Markoviĉ Zamenhof, kadre de la 94a Universala Kongreso de Esperanto estis prezentita la unua eldono de *Homarano*. Laŭ la kutimo de tiaj ceremonietoj, ĉeestantaj kongresanoj gratulis kaj deziris rapidan disvendiĝon de la libro kaj baldaŭan reeldonon. Aŭskultante ilin, mi kontente kapjesis kaj ridetis, sed kun iom da skeptiko interne: ja mi bone scias, ke en Esperantujo oni konsideras bona rezulto disvendiĝon de libro dum du-tri jaroj...

Mirinde, sed la bondeziroj realiĝis! Jam ses monatojn post la Bjalistoka prezentado nia stoko komplete elĉerpiĝis — jen plezuro por la aŭtoro-eldonisto-librovendisto! Kaj, pli grave, tio estas signo de la daŭra intereso de nia legantaro pri Zamenhof kaj ties ideoj! Pri tiu intereso atestas ankaŭ multaj entuziasmaj reagoj, ricevitaĵoj post la eldono, pro kiuj mi dankas al ĉiuj reagintoj.

Unu jaron post la eldono de *Homarano* aperis sur lumdisko ĝia japana traduko, prizorgita de plurdekpersona traduk-teamo. Intertempe, laŭ mendo de Esperantic Studies Foundation (ESF), kiu deziris eldoni modernan biografion de Zamenhof en lingvoj naciaj, mi verkis resumon de *Homarano*; kaj la 15an de decembro 2009, je la tago de la 150-jariĝo de Zamenhof, en la retejo de ESF aperis ĝia angla versio *Zamenhof: The Life, Works, and Ideas of the Author of Esperanto*, tradukita de Ian Richmond. Baldaŭ poste la angla teksto estis eldonita libroforme, kaj en junio 2010 ĝi aperis ankaŭ en Esperanto kun la titolo *Zamenhof: Biografia skizo*.

Tamen tiuj, kiuj ne sukcesis aĉeti *Homaranon* kaj kiujn ne kontentigis la mallonga *Biografia skizo*, petis reeldonon. Kaj kiam tiujn petojn



kompletigis mendoj de libroservoj, ni kapitulacis. Do la dua eldono aperas en 2011, sed ne, laŭ nia plano, en 2017 — la jaro de la centa mortodatreveno de Zamenhof.

Kvankam ni havis je dispono unu jaron ĝis la reeldono, tio estis tro malmulta tempo pro laciga kaj temporaba pendolado inter Kaliningrado kaj Moskvo; kaj post la trudita instaligo en Moskvo ni ne plu povis konsulti niajn bibliotekon kaj arkivon en Kaliningrado. Krome ni ja devis ĉiumonate eldoni *La Ondon de Esperanto* kaj fari amason da pliaj aferoj. Sed malgraŭ la komplikitaj cirkonstancoj, ni faris nian plejebulon, kaj la dua eldono aperis antaŭ la Kopenhago UK.

Ĝi estas pli ol simpla reeldono.

Unue, danke al multaj libervolaj helpantoj, en ĝi estas korektitaj pluraj miskompostajoj kaj kelkaj faktaj eraroj, kiuj makulis la unuan eldonon. Sed korektante la erarojn, mi tute ne korektis la koncepton, kiun kelkaj ŝatus ŝanĝi — *Homarano* plu restas libro pri Zamenhof, pri liaj vivo, verkoj kaj ideoj, kaj mi plu klopodis ne deflankiĝi al akcesoraj

temoj politikaj kaj historiaj, krom malmultaj kazoj, kiam ekskursoj al historio estis neeviteble necesaj por kompreno de iuj epizodoj.

Due, la nuna eldono, malgraŭ la iom pli densa enpaĝigo, estas je 40 paĝoj pli ampleksa ol la antaŭa. Ĝi ampleksiĝis, interalie, pro nova materialo, trovita de mi en la Rusa Ŝtata Historia Arkivo (Peterburgo), pri Mark Fabianoviĉ Zamenhof, kies vivo en la unua eldono estis ne tute ĝuste prezentita pro mia trofido al la antaŭe publikigitaj studoj de niaj zamenhofologoj. Mi ankaŭ profitis utiligi la intertempe aperintajn aktojn de la esperantologia konferenco en Bjalistoko kaj de la homaranisma simpozio en La Chaux-de-Fonds (ambaŭ en 2009), kaj, plej laste, la surdiskan kolekton de la kvar PVZ-eroj, kiujn Itô Kanzi kompilis, sed ne sukcesis eldoni. La nova eldono enhavas ankaŭ nomindekson de la menciitaj personoj kaj, imite al kelkaj el la Ludovikitaj volumoj, du recenzojn.

Ne ĉio, kion mi intencis fari antaŭ la reeldono, planita por 2017, estas realigita, sed mi estas kontenta pri la rezulto de nia laboro en la malfavoraj kondiĉoj de la okazonta, okazanta kaj, fine, okazinta transloĝiĝo. Ĉi tiu rezulto ne estus atingebla sen la konstanta helpo de mia edzino Halina, kiu, spite al siaj gravaj sanproblemoj, abnegacie dediĉis centojn da horoj al plurfoja provlegado kaj kontrolado de la teksto.

Kiel aŭtoro kaj eldonisto de ĉi tiu libro, kaj ankaŭ kiel admiranto de Zamenhof, mi esperas, ke ankaŭ la dua eldono ĝuos sukceson ĉe la legantoj.

La dua eldono de *Homarano*, danke al helpo de amikoj el Litovio, estis aĉetebla en la libroservo de la 96a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago.

Nun oni povas mendi *Homaranon* kontraŭ 27 eŭroj ĉe la libroservoj de UEA kaj FEL, kaj ĉe aliaj grandaj libroservoj. Ĝin oni povas aĉeti ankaŭ en la sidejo de la Litova Esperanto-Asocio en Kaŭno (strato Zamenhof, domo 5).

Aleksander Korĵenkov

La deka kajero de *Beletra Almanako*



La islanda poeto Baldur Ragnarsson ricevas ĉi-numere omaĝon: kvin freŝaj poemoj el lia plumo, sed ankaŭ li rememoras pri Juan Régulo Pérez kiel eldonisto kaj verkisto tra propra sperto de multjara rilatado. Krome, Nicolino Rossi esploras la Ragnarssonan fenomenon en sia recenzo de lia plena verkaro *La lingvo serena*, kiu, aldone, inspiris la italon al poeziaj *Pensoj kaj pripensoj*.

Originalaj prozaĵoj venas de la regulaj BA-aŭtoroj Sten Johansson, Jorge Camacho, Cindy McKee kaj Bjørn A. Bojesen. Poezion kontribuas Mikaelo Bronŝtejn kaj István Ertl.

Sten Johansson eseas pri *Dialogo en prozo*, garnante sian tekston per pluraj ekzemploj. Eseo de Ken Miner fokusiĝas al Niĉeo kiel filologo. Gonçalo Neves konigas akran tekston pri la nuntempa socio *Prometeo* de la hispana verkisto Manuel Vincent. *11 pensoj* de la rumana aŭtoro Nichita Stănescu aperas per la traduko de Ionel Oneț. Plian rakonton de Ĝoni Ramonov tradukis el la rusa Slavik Ivanov. Jorge Camacho tradukis el la majorka (kataluna) du poemojn de sia bofrato Llorenç Ballester, inspirita de la vojaĝo en Himalajo.

Riĉa elekto de artikoloj diverstemaj: Wael Al-Mahdi pri *La nuntempa psikologia ŝanĝiĝo en la araba mondo*, Jean Amoureux mallonge skizas la intereseĝan vivon de Jean Ribillard. Eseo de Miguel Fernández prezentas la personecon de la hispana poeto Miguel Hernández en la kadro de la Arĝenta Epoko. Aperas ankaŭ lia *Alvoko al la ibera grupo* por kunlaboro en la grandioza projekto *Generacio 27*. Verki pri Verda Majo inspiris al Jorge Camacho legado de ŝia unuvoluma verkaro dum lia vojaĝo al Tajvano. Aparte rava estas la artikolo de César Mallorquí *Bibliomanio*, kies rakonton ni vidis ankaŭ en BA-9.

Nekutime ampleksa por la Esperanta gazetaro estas la recenza sekcio de BA — ĉi-foje sur 34 paĝoj estas 10 recenzoj, interalie, pri *La sekreta miraklo* de Borges (A. Giridhar Rao), *La liberiĝo de la juĝisto* de Ferenc Szilágyi (Antonio Valén), *Nu, kaj do?* de Sen Rodin (Ricardo Felipe Albert Reyna), *Dek gazetoj* (Jorge Camacho), *La eta princo* de Antoine de Saint-Exupéry (Jorge Camacho), *Kvazaŭ ĉio dependas de mi* de Trevor Steele (Sten Johansson kaj István Ertl) k.a.

Resume: denove leginda almanako, kiun ornamas pentraĵoj de Marta de la Sota.

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 1*: Paroliga metodo kun ekzercaro. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2008. — 152 p., il.; disko. — [Recenzoekzemplero].

Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 1*: Paroliga metodo kun ekzercaro. Gvidlibro por instruistoj. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2008. — 166 p., il.; disko. — [Recenzoekzemplero].

Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 2*: Paroliga metodo kun ekzercaro. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2010. — 178 p., il.; disko. — [Recenzoekzemplero].

Barboza, Josias. *Esperanto por lernejoj klasoj 2*: Paroliga metodo kun ekzercaro. Instruista gvidlibro. — Braziljo: Unio Planeda; BEL, 2010. — 184 p., il.; disko. — [Recenzoekzemplero].

Kováts, Katalin. *Stelsemantoj en la ora nordo*: Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj. — Den Haag: E-duKati, 2011. — 159 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Okcitanaj kantoj en Esperanto / Kompilis, tradukis el la okcitana kaj franca Ludmila Novikova. — Moskvo: Impeto, 2011. — 40 p.; 500 ekz.; disko. — [Donaco de Ludmila Novikova].

Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako, 2011/10; EAB Update, 2011/54; Esperanto Aktuell, 2011/3; Esperanto en Azio, 2011/72; Esperanto en Danio, 2011/3; Esperanto en Skotlando, 2011/198; Esperanto sub la Suda Kruco, 2011/106; Esperanto, 2011/6; Esperantolehti, 2011/3; Femina, 2011/26; Ĝenerala Informilo, 2011/168; Heroldo de Esperanto, 2011/5,6,7,8,9; Informilo por interlingvistoj, 2011/2; Internaciisto, 2011/3; Kontakto, 2011/2; La Gazeto, 2011/154,155; La Lanterno Azia, 2011/5,6; La Movado, 2011/7,8-9; La Ondo de Esperanto, 2011/7; La Revuo Orienta, 2011/4,6; Le Monde de l'Espéranto, 2011/578; Literatura Foiro, 2011/251; Monato, 2011/7; Norvega Esperantisto, 2011/3; REGO, 2011/3; Scienco kaj Kulturo, 2011/3; Usona Esperantisto, 2011/3.

Literatura Foiro, 2011, №250

La dekoble arĝenta jubilea numero ekas per artikolo de Márton Fejes pri poemo de Julio Baghy en traduko de Kálmán Kalocsay: ĝi enkondukas la legantaron al la generacio de la Dek-unua. Fakte en 1911, en tute malsamaj cirkonstancoj, esperantiĝis ne nur Baghy kaj Kalocsay, sed ankaŭ Raymond Schwartz kaj Sándor Szathmári, al kiuj la revuo dediĉos paĝojn en sekvaj numeroj de sia 43a jarkolekto.

Kaj jen la enhava resumo de ĉi tiu 250a numero, al kiu Giorgio Silfer, kunfondinto kaj ĉefredaktoro ĝis aprilo 1980, dediĉas analizon de la defioj dum la pasintaj 42 jaroj kaj ankaŭ pri la perspektivoj en la nuna jardeko.

Originala literaturo: *Ĉu Dio inas?* — poemo de Nicolino Rossi; *La fera barilo* — rakonto de Julian Modest; recenzo de Till Dahlenburg pri la poemaro *Esperanta versaro* de Jaroslav Krolupper.

Invito al teatra premiero: nova originala teatraĵo *La kronikoj de d-ro Hofman* de Barry Friedman.

Lingvo nia: Anatolo Gonĉarov pri tio, kiel la popoloj buŝas propramaniere.

La sepa arto: Giorgio Silfer pri *En Okcidento nenio nova*, kun interesa komparo pri la romano kaj la filmo.

Historio: Carmel Mallia pri la stranga vivitinero de la granda malta intelektulo kaj revoluciulo Manwel Dimech, kiu de prizonulo fariĝis lumulo.

Sociologio: Leen Deij eseas pri la globaligo, kaj Neli Holeviĉ prezentas la libron *Esperanto-identeco: citaĵoj kaj komentoj* de Anatolo Gonĉarov, eldonitan antaŭ nelonga tempo.

La revuon *Literatura Foiro* posedas, eldonas kaj administras LF-koop. Ĉefredaktoro: Ljubomir Trifonĉovski.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la juniaj “Proverboj trovendaj” venis 18 respondoj, ĉiuj estas tute ĝustaj. Ilin sendis: Brian Bishop, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jacqueline Huberdeau, Anne Jausions (Francio), Hans-Burkhard Dietterle, Edeltraut Henning (Germanio), Alexander Mikishev (Israelo), Jadwiga Benicka, Dorota Burchardt, Mirosława Kubicka, Stanisław Płachta, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski, (Pollando), Anatolo Sidorov (Ruslando), Keneĉjo Goldbergo (Usono).

La libropremion lote gajnis *Stanisław Płachta*, kiun ni gratulas.

La proverboj estas jenaj:

“Al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas”

“Tro saltas la rato — ĝin kaptas la kato”.

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la ciferoj ne ripetiĝu. La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de oktobro 2011.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

			3					
	3				7		5	
5		6				1		7
	1							
3			9	2	6			4
							7	
6		7				8		9
	9		4				2	
				8				

Juda humuro

Kial frizistojn?

Tio okazis antaŭ pli ol 100 jaroj en Dvinsk (nun Daugavpils, Latvio). La juna judo Izaak iris al sia dunganto — nejuda fabrikestro — kaj diris:

— S-ro direktoro, mi ne plu povas labori por vi. Ĉiuj viaj nejudaj laborantoj estas antisemitoj.

— Kio? Kion vi rakontas? — la estro miris. — Eble ĉe ni estas unu aŭ du antisemitoj, sed certe ne ĉiuj.

— Mi diras al vi, ke ĉiuj estas antisemitoj. Cetere, mi faris teston: Mi prezentis al ili la saman demandon kaj ĉiuj respondis same. Ĉiuj estas antisemitoj!

— Kiun demandon?

— Mi demandis, kion ili opinius se oni ekstermus ĉiujn judojn kaj ĉiujn frizistojn?

— Ĉu frizistojn? Sed kial frizistojn?

— Nu, vi vidas: ankaŭ vi!..

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Kolektas plia reduktoro!

Stano Marček <...>: Mi estimas la stilojn de diversaj homoj. Estas afero de eduko, mia patrino min edukis tiel. Mi kolektas stilajn erarojn. (“Stano Marček: ‘Ne kritiku, sed helpu!’”, liberafolio.org/2011/stano-marcek-2011dne-kritiku-sed-helpu-2011d, 28 jul 2011; rimarkis Marc Bavant)

Obeza kontraŭ ŝtormoj

UEA estas unu el tiuj dikegoj, kiujn oni konstruas por supervenki la fortojn de la plej fortaj tajdoj kaj uraganoj. (José Mário Marques, yahoo-grupo uea-membroj, mesaĝo 19586, 4 aŭg 2011)

Skua etoso

Nun venas la tempo por duhora Elektra Ĝenerala kunveno. (Audrys Antanaitis, prezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio: Cirkulero al membroj de TEĴA, Vilno, 6 jun 2011)

Kurtega kroatinio

... la historio de kalendaroj estas interese, sed mi mal-longos plejeble. (Ljubica Sedmak: Nombroj aŭ nomoj por monatoj? // *Heroldo de Esperanto*, 2011, №5, p. 4; rimarkis Ionel Oneţ)

Pendi pro komo, aŭ: Tio de-pendas

... granda plimulto eĉ de 60-jaruloj... tute ne interesiĝas pri tiaj pedantaĵoj, verŝajne tute prave. Sed mi estas pendanto. (Edmund Grimley Evans: Oksforda komo, ipernity.com/blog/28331/316508, 22 mar 2011; malkovris Toño del Barrio)

Aĥ, kiaj ni estas feliĉaj, ke venas tiaj kondiĉoj

Se iu deziras proponi al mi interesan kontrakton, tio eblas, laŭ miaj kondiĉoj. (Etel Zavadlav. Objektiva raporto de deĵoranto en KCE. HeKo 489 1-B, esperantio.net/index.php?id=1779, 27 jul 2011)

La angla, fortike fiksita

Ili sopiras, ke la solvo estos en maŝina tradukado de tekstoj, sed ne scias kiam kaj ili konsentas, ke la angla estu leĝe ligata/bindata. (Jozef Rei[n]vart. Ree pri patento-problemo kaj lingvoj // *Eŭropa Bulteno*, novembro 2010, p. 8)

Eĉ ursoj de Di' estas filoj?

... en Białystok <...> loĝis diversaj popolgrupoj malkune: poloj, ursoj, germanoj, judoj kaj litovoj. (Douglas Draper, yahoo-grupo informado, mesaĝo 1814, 24 maj 2011, rimarkis Lu Wunsch)

Ĉu reta mamzono?

... okaze de la forpaso de Claude Piron mi tuj lanĉis mamorpaĝon honore al li. (Katalin Kováts, listo denask, 8 jun 2011, rimarkis Lu Wunsch)

Plukis **István Ertl**

VENU AL ARKONES

Poznań (Pollando), 23–25 sep 2011



Danlando. E@I-aktivuloj en la komuna ESF-E@I informbudo dum UK: Maja Tišljár, Peter Baláz, Jevgenij Gaus, Erin Piatecki. Kunsidoj pri novaj projektoj okazis ankaŭ rekte en la budo. Kreema etoso ne mankis, naskiĝis pluraj ideoj kaj iniciatoj — legu pli en la venonta *Ondo*. (Fotis Kalle Kniivilä)



Ukrainio. La programo de la 67a Internacia Junulara Kongreso en la ĉefurbo de Ukrainio (vd. p. 5), kiu post unu jaro gastigos (kune kun Pollando) Eŭropan Futbal-ĉampionadon, enhavis futbalan matĉon inter Ukrainio kaj la Cetera Mondo. Post la matĉo la teamanoj kune fotiĝis. (Fotis Ivo Miesen)

iam kompletigota plena verkaro de I. I. Zamenhof

Nova postrikolto finfine aperis!

iam kompletigota plena verkaro de I. I. Zamenhof

1. la preparado de la bulonja kongreso
2. carlo bourlet kaj la revuo
3. 1917, forpasis nia majstro
4. dumilitaj esperoj

nove elfositaj 4 dokumentoj, kompilitaj de Ludovikito por pliampleksigi PVZ

Libroteko Tokio

900 paĝoj en kvar kolektoj en unu disko. Kolektis kaj kompostis Ludovikito. Eldonis Libroteko Tokio. Prezo de la tuto: nur 12 eŭroj. Mendebla ĉe UEA, JEI kaj KLEG.



Esperanto-urbo. Esperanto-grupo partoprenis la tradician festmarŝon dum la Pentekosta popolfesto en Herzberg. La bone organizita grupo inter multaj aliaj kluboj, asocioj, muzikistoj, estis laŭte anoncita, bele prezentita de la organizantoj kaj vikle salutata de lokuloj laŭ la marŝvojo tra la urbo. (ICH)



***67a Internacia Junulara Kongreso en Kievo (Fotis Ivo Miesen)
4a Somera Esperanto-Studado en Nitra (Fotis Peter Novotníček)***

